

Senŝtacia Revuo



Patriotismo devas esti subpremata kaj detruata per ĉiuj de prudentaj homoj dependantaj rimedoj.
Leo N. TOLSTOJ.

Organo de la Tutmonda Laboristaro
ANTAŬE
ESPERANTISTA LABORISTO

Jara abono : Anglio, 5 ŝil. ; Aŭstrio, 150 kr. ; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr. ; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev. ; Ĉekoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr. ; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr. ; Germanio kaj Finnlando, 25 mk. ; Hispanio, 7 pes. ; Hungario, 60 kr. ; Italio, 12 lir. ; Nederlando, 3 g. ; Polio, 300 mk. ; Svisio, 6 sv. fr. ; Usono, 1 1/4 dol. Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKCIO : E. LANTY

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS (Francio)

ADMINISTRACIO : L. GLODEAU

177, Rue de Bagnolet — PARIS (Francio)

MONDLINGVO KAJ KLASBATALO

La disvolvigo de la kapitalista sistemo diversmaniere influis la mondlingvan movadon.

Unuflanke, la ideo de internacia lingvo, iluzio kaj utopio ĝis la mezo de la pasinta jarcento, fariĝis realaĵo sole per la giganta evoluo de la granda industrio en la epoko de la kapitalismo. La fervojo ligis la malgrandajn naciojn de la malproksimaj anguloj de la Eŭropa kontinento al la granda korpore de la jam pli civilizitaj popoloj. Ili ekvekigis sub la fajra spirego de la lokomotivoj, de la perfektigita maŝinaro kaj de la moderna spirito. Anstataŭ unu aŭ du lingvoj en ĉiuj landoj konataj kiel ĝeneralaj interkomprenigiloj, nombregoj da lingvoj ekpostulis subite disvastiĝon trans la limojn de siaj propraj nacioj. La nombro pli kaj pli kreskiĝanta de la vekigintaj popoloj multobligis la lingvajn malfacilaĵojn, ĉar la studado de ĉiam pli multe da lingvoj fariĝas necesega.

Sed la kapitalista produktadmaniero vekis ne nur la malgrandajn, ankoraŭ malmulte disvolviĝintajn naciojn. Ĝi kreis la klason kies historia tasko estas la anstataŭo de la kapitalista sistemo per la kolektivisma : la modernan proletaron. Kaj por ke tiu proletariato faru utilajn servojn al la burĝa societo, ankaŭ ĝi devis esti elŝirita el la senkultura dormado, en kiu vivetadis ĉiuj antaŭaj ekspluatataj klasoj kaj la plejmulto de la Eŭropaj nacioj. Vaporo kaj elektro, ĉiuj inventaĵoj kaj konkuraĵoj de la tekniko kaj de la scienco plifaciligis la transiron de la landlimoj ankaŭ al la senposedaj

klasoj. La bezono je internacia lingvo ekkaptis ĉiujn popolojn, ĉiujn klasojn, ĉiujn branĉojn de la kapitalista socio.

Esperanto disvastiĝis. Ĝi fariĝis instrumento unuiganta la individuojn de la diversaj nacioj, akcelanta la reciprokajn ekkonon kaj komprenon de la membroj de la homaro. Eĉ ekaŭdigis personoj, certe tre sinceraj, bonkoraj kaj plej estimindaj homoj, kiuj esperis, ke per Esperanto ankaŭ la klasaj interbataladoj malaperos. Ili ne pripensis ke kontrastoj kreitaj de historia procesuso povas esti solvataj nur per la historia disvolvigo mem, kaj ne per klopodoj je arta, ne natur-evolua kunligo.

La grandega buĉado de la jaroj 1914 ĝis 1918 montris klare, ke ĉiuj revoj je nacia kaj klasa pacigo per Esperanto estis nerealigeblaj. Esperantistoj sin kontraŭbatalis kiel plej sovaĝaj malamikoj, Esperantistoj fariĝis ŝovinistoj, subtenante siajn respektivajn imperialistajn registarojn. Ne nur ili mem subtenis siajn ĉefbuĉantojn kaj ĉefmurdistojn, ili eĉ metis Esperanton en la servon de la rabistaj celoj de la diversnaciaj kapitalistaroj. Per Esperanto ili klopodis influi la publikan opinionon de la eksterlando, kaj dum francaj Esperantistoj nepre volis konvinki la homaron, ke Alzaso-Lotaringo apartenas jure al Francujo, germanaj Esperantistoj faris viglegan propagandon por pruvi ke tiu landeto devas resti ĉe Germanujo. La unuj kaj la aliaj servis per tiu agado siajn militemajn kaj rabemajn registarojn.

La mondmilito fakte disbatis la iluzion de tiuj, kiuj estis kredintaj ke Esperanto povas per sia interna ideo mem fratigi kaj pacigi la homaron. Ĝi

pruvis per nekontraŭdireblaj argumentoj, ke la Esperantistoj ne servas la Esperantismon, sed ke la lingvo Esperanto devis servi la blindajn, ŝovinistajn celojn de la militemuloj. Ĝi montris plej klare ke Esperanto ne estas forto influanta la homojn noblige kaj pacige, sed instrumento servanta la plej diversajn interesojn de la plej diversaj individuoj, de la filatelistoj kaj de aliaj diverspecaj kolektantoj same kiel tiuj de la multenombraj politikaj tendencoj.

Kiam finfine la imperialista hommortigado ĉesis, novaj problemoj ekstarigis antaŭ la civilizita homaro. La klasaj kontrastoj per la milito plifortigis. Al la periodo, dum kiu unu parto de la societo estis doninta sian sangon kaj sanon en la tranĉeoj por la orrikolto senlima de la alia parto, sekvis la periodo, dum kiu la posedantaj klasoj, kulpaj je la milito, klopodis meti ĉiujn ŝarĝojn de la milito sur la ŝultrojn de la neposedantoj, ĵetegitaj en la plej ekscitantan mizeron per la militemo de la regantaj klasoj.

Jam la kapitalista klaso, mortiga malamiko de la proletariaro tutmonda, metas Esperanton en sian propran servon, por ĝin uzi por siaj klasaj celoj: ekspluatado de la laboristaj popolmasoj, imperialista influo ĉie sur la tero. Jam la Ligo de la Nacioj, la plej alta reprezentantaro de la grandaj kapitalistaj Potencoj, estas uzonta Esperanton kiel oficialan lingvon. Kiu scias ĉu la packontrakto, per kiu finiĝos la proksima imperialista mondmilito, ne estos redaktata en Esperanto? La lingvo de la grandanima, homamanta geniulo Zamenhof — servante al la sigeligo de malpura, krima, rabista dokumento, multoble pli malpura, pli krima kaj pli rabista ol tio de Versailles!

Tiuj faktoj klare difinas nian pozicion en la Esperanto-movado. La regantaj klasoj uzante la internacian lingvon por siaj celoj, la laboristaro de ĉiuj landoj rajtas, ja havas la devon historian, uzadi Esperanton por siaj propraj klasaj celoj, por la proletaria klasbatalo, por la renverso de la kapitalista sistemo. La tutmonda burĝularo metas Esperanton en la servon de la kontraŭ-revolucio — kial ni Esperanton ne utiligos por la revolucio?

Tiel la laboristaro internacia devas ĝojplene saluti la decidojn de la Praha kongreso de *Sennacieca Asocio Tutmonda*. Per tiuj decidoj eniras nova spirito en la Esperanto-movadon. Ĝis nun okazis ofte, ke proletario bedaŭre pensis, ke li eble per poresperanta laboro ŝtelas tempon al sia liberiga batalo kontraŭ la kapitalismo. Sed nun neniun laboristo esperantista havos plu tiujn zorgojn: laborante por S. A. T., li laboras samtempe por la klasbatalo, por la renverso de la kapitalista societo, por socialismo. Kaj li utiligos Esperanton por atingi tiujn celojn!

L. REVO.

LA

I^a Internacia Kongreso de la Revolucia Esperantistaro

Praha, 1-2-3 Aŭgusto 1921, ĉe lernejo Sta-Adalberto

Konvenas enpresi resume la protokolon, por ke ĉiu ano de nia Asocio povu prezenti al si la fizionomion de la kunsidoj.

Komence la afero iris iom brue kaj konfuze. Tio ne ŝajnas miriga, kiam oni scias, ke kelkaj ĉeestantoj ne estis membroj de « Liberiga Stelo », kaj antaŭe ne estis studintaj la projekton de statutoj prezentitan de la *Organiza Komitato Pariza*. Al tiuj K-doĵ la O. K. konsentis parol- kaj proponrajton, sed rifuzis voĉdonrajton. Kiu povus mallaŭdi tiun agmanieron? Estas vere strange, ke K-doĵ, kiuj sciis pri niaj penoj kaj klopodoj jam de unu jaro tamen atendis ĝis la Kongreso por aliĝi! Ĉu decidis al ili postuli voĉdonrajton? Iom da hontemo iliaflanke konvenus.

Malgraŭ konfuza komenco, estas nekontesteble, ke niaj kunsidoj estis el la diversaj fakkunvenoj unuj el la plej daŭre kaj bone ĉeestataj. La viglaj diskutoj nur montris, kiom interesa estis la afero por la ĉeestantoj.

Partoprenis K-doĵ el Anglio, Aŭstralio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Rusio, Rumanio, Svedio, Svisio. Sume: 79, el 15 nacioj.

La plano de la O. K. celis eviti du rifojn: 1-e malhelpi, ke nia Asocio estu sub la influo de tiu iluzi plena spirito nomata « Homaranismo », kaj 2-e, ke ĝi konsistu nur el membroj de sama politika partio. Precipe la komunistoj deziris tion ĉi, tute ne atentante, ke nune tia organizaĵo ne estus vivkapabla. Tamen la plimulto da ili konsciis pri la realeco kaj akceptis nian projekton, dum kelkaj, kvankam kunlaborantaj en la neŭtrala U. E. A. — eĉ kiel delegitoj — tamen malcedeme ne volis sin kompromisi (!) en nia ne tute pure komunista Asocio. Kiom nekonsekvence!

Okazis en aliaj ĉambroj kunvenoj de « socialistoj » kaj de « laboristoj ». Sed laŭ nia scio ili ne atingis pozitivan rezulton. Nur la « Satanoj » sukcesis starigi — pli ĝuste, pli firmigi, ĉar jam la Asocio ekzistis — organizaĵon, kiu povos fariĝi potenca se ĉiuj klaskonsciaj proletarioj aliĝos. Al ili ĉiuj la pordo estas malfermata. Ili eniru, la laboro ne mankas.

ĈESTINTO.

Kongresa Protokolo

1-a Kunveno. (1. Aŭgusto 1921). — Jam je la 8-a matene, kelkaj kongresanoj interkonatiĝas en la lerneĵĉambro. Je la 9-a, 46 K-doĵ ĉeestas. K-do *Petr* (Praha), malfermas la Kongreson. Bonvenan saluton. Elektu de la kunsidkomitato. *Petite*, K-do *Adam* rifuzas. Unuanime estas elektita, kiel prezidanto K-do *Petr* (Praha), vicprezidanto K-do *J. R.* (H.), sekretario K-do *Deubler* (München-Bavario).

K-do *Bannier*, sekretario de *Liberiga Stelo*, je la nomo de la iniciatora komitato, legas raporton pri la ĝisnuna agado de la Asocio. Li montras la ĉiaspecajn malfacilaĵojn kaj barojn venkitajn, laboron faritan antaŭ ol atingi la nunajn rezultatojn. Li citas la nomojn de la unuaj pioniroj de nia movado en Marseille, Frankfurt, Dresden, Leipzig, München, Barcelono, Kristiana, k. t. p. Li gratulas la laboristan kooperativon « La Bellevilloise » (Paris), al kiu ni ŝuldas la ekvilibron de nia financo; li proponas sendi dankan telegramon al tiu kooperativo. Kelkajn vortojn pri la servoj ĝis nun donitaj de L. S.; li atentigas pri la graveco de la servoj, kiujn ni povus eltiri el multmembra organizaĵo tutmonda. Li tuŝetas la demandon « Literaturo ». Li finas, dirante, ke la iniciatora komitato deziras allasi la direktilon de la Asocio al pli laŭjura organo balotita de la anaro mem.

Tiu raporto estas unuanime aprobita.

K-do *Adam* (Paris), proponas, ke ĉiu parolonto havu rajton paroli nur 5 minutojn en ĉi-tiu kunsido, en la aliaj 10 m. Tiu propono estas unuvoĉe akceptita.

K-do *Petr* pro manko da sperteco, kiel prezidanto, petas transdoni sian oficon al K-do *J. R.* (H.). Akceptite.

Dume, oni kontrolas la rajtigilojn de la delegitoj, nome: Grupo de Leipzig (K-do Lammerhirt); de Dresden (K-do Goldstein); de Frankfurt-a-M. (K-do Kockeritz); de Paris (K-do Guihéneuf); de Troyes (K-do Hugot); de München, Augsburg kaj Traunstein (K-do Deubler); de B. (K-do J. R.); de Praha (K-do Jar Petr); de Kristiana, Bruksel kaj

Strasburg (K-do Bannier). — Mandatoj senditaj al Kongreso, sen nomo de delegito: Grupoj de Lyon kaj de Kronstadt (Rusio). — Ankaŭ K-don Petr delegis «Progreso», de Lisbono (komunista esperantista grupo), sed tiu mandato ne valoras, ĉar neniu el tiu grupo ĝis nun aliĝis al Lib. St. (!).

K-do Prezidanto sciigas, ke ni troviĝas antaŭ du projektoj de statuto: unu redaktita de la iniciatora komitato, alia de la tri bavaraĵ grupoj reprezentitaj de K-do Deübler. Prezidanto komencas legi la projekton de la iniciatora komitato.

K-do Sidlo (Praha), sin deklaras kontraŭ la titolon, precipe kontraŭ la vorton «sennacia», kiu, liaopinie, ĝenos la varbadon en Ĉeĥoslovakio. Li proponas la vorton «internacia».

K-do Hugot-Raison (Troyes), opinias, ke «Sennacieca Asocio Tutmonda» ne sufiĉas; li proponas aldoni: «... de l'antaŭenemaj esperantistoj».

K-do Adam respondas al K-do Sidlo kaj Hugot. Unue, li rimarkigas al K-do Sidlo, ke li eraris dirante *sennacia* anstataŭ *sennacieca*. Tiuj du vortoj ne estas samsignifaj. La nacioj ekzistas. Bedaŭrinde! Malsanoj ankaŭ ekzistas. La vorto *sennacieca* entenas la tutan celon, la estonton. Ĉar ni estas samlingvanoj, ni montru la vojon, ni provu funkciigi embrie societon, kiel estas dezirinde, ke funkciui estonte la universala socio. Pri varbado li diras, ke pli preferinda estas la kvalito de la membroj ol la kvanto.

K-do Klauber (delegito de la komunista partio germana), tute aprobas la diron de Adam. K-do Petr proponas «Supernacia».

K-do Bannier malakceptas tiun ĉi proponon. Li klarigas la malsamajn sencojn de la du vortoj «sennacieca» kaj «supernacia». U. E. A. estas «supernacia», tamen nenio el ĝi estas kontraŭa al la ideo de naciismo, dume en nia proletaria organizaĵo, nia pordo estu fermata je ĉiuj ajn naciistoj. Nia agado ne estu pasiva supernaciismo, sed aktiva kontraŭnaciismo. Tial li defendas la vorton «sennacieca».

Post tiu deklaro, K-do Sidlo (Praha), forlasas la kunvenon malkontenta.

K-do J. R. atentigas, ke tro «revoluciema titolo» malhelpas la propagandon en landoj, kie regas blanka teruro. Poste li saltas en alian temon tute ekstere de la tagordo. Pro tio protestas samtempe pluraj K-doĵ. Bruado. Sekve, J. R. rezignas pri prezidanteco.

K-do Révo (Berlin), lin anstataŭas. Li proponas ĉesigi la diskutadon pri la titolo, kaj tujan voĉdonon.

K-do Deübler akre protestas. Ĉiu devas ĝui plenan liberecon de parolo.

Tamen akceptita estas la propono de Révo; oni tuj voĉdonas pri la titolo. Ĉar, laŭ kongresa regularo, rajtas voĉdoni nur la membroj, tial, en ĉiu voĉdono ili devos montri sian membrokarton. Tiel farite, nur du voĉoj kontraŭaj. La titolo «Sennacieca Asocio Tutmonda» estas akceptita.

K-do J. R. proponas la ĉesigon de la diskutado pri la statuto, por priparoli pli gravajn aferojn.

K-do Petr rebatas tiun opinionon. Ni devas sekvi la programon.

Prezidanto voĉdonigas; la diskutado pri statuto daŭros. Li legas la unuan artikolon.

K-do Deübler deziras, ke nia statuto neniel aludu pri la politikaj partioj kaj teorioj; ekz.: anarkiismo kaj socialismo. — K-do M. (H.), diras, ke la Zamenhofs «interna ideo» ne sufiĉas al ni; ni estu ĉiam revoluciemaj.

K-do Kolev (Sofia), admonas la ĉeestantaron ne interdisputi pri bagateloj. Ni diskutu senpasiĝe kaj kamarade. Same parolas K-do Kockeritz.

K-do Klauber proponas prokrasti ĝis venonta kongreso la debaton pri tiu artikolo.

K-do Révo longdaŭre kaj elokvente parolas pri la celo de nia organizaĵo. Li denuncas la falsan neŭtralecon de la esperantistoj-burĝoj; li citas S-ron Ellersiek, kiu — en sia revuo subvencata de la registaro — gloris la submaran militon; li citas S-inon Cense, kiu ĵus en Dresden aŭdacis aserti, ke la naciismo internacismon superas. Blindaj estas tiuj, kiuj neas la ekzistadon de la klasbatalo en Esperantio; Esperantistoj ni estas! jes! sed ni restu klasbatalokonsciaj.

K-do Bannier proponas anstataŭigi la vortojn «socialismo, komunismo...», k. t. p., per la frazo jena; «utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda». (Tiu frazo estis proponita de K-do Révo en la antaŭkongreso de Dresden. — K-do Altermann aprobas.

Ree, K-do J. R. petas la ĉesigon de la diskutado.

K-do Deübler male petas la legadon de sia projekto.

Prezidanto tion faras..., sed la horo ne permesas atendi plue. La kunvenon K-do Révo fermis je 12 1/2. Li invitas ĉiujn ĉeestantojn apartenantajn al komunista partio, partopreni specialan kunvenon okazontan posttagmeze je la 5-a, por diskuti nian aferon laŭ komunista vidpunkto.

2-a Kunveno. (2 Aŭgusto 1921). — Malfermiĝis je la 9-a matene.

K-do Révo (Prezidanto), volas rapidigi kaj precipe ordigi la diskutadon. Laŭ li, ni devas debati nur pri unu projekto, kaj ne pri du samtempe (tiu de la iniciatora komitato, kaj tiu de la bavaraĵ grupoj). Li kritikas tiun ĉi lastan, kiu baziĝas sur naiva homaranismo, kaj ŝajnas ignori la klasbatalon. — Unuanime la projekto bavara estas forjetata el la diskutado, malgraŭ la energiaj protestoj de K-do Deübler.

K-do Jost (Zurich), provas prui, ke «longa statuto» signifas «malgrandan valoron».

K-do J. R. triafoje juĝas sufiĉa la debaton.

K-do Deübler protestas kontraŭ la agmaniero de la prezidanto. Konfuzo. Bruado.

K-do Adam diras, ke estas videble, ke multaj el la ĉeestantaj kamaradoj ne legis sufiĉe atente *Esperantista Laboristo*, en kiu la demando pri organizado estas detale pritraktita. Ne dum kongreskunsido, en tia varma kaj ekscita atmosfero, oni povas bone pridiskuti tian gravan temon. La Iniciatanta Komitato serioze pripensadis la temon pri nia nepre bezona organizaĵo. La Parizaj K-doĵ metis en la projekton de statuto ĉion, kio estas en ili plej bona: sian sperton, sian scion, eĉ iom da sia koro. Se oni ne akceptas tiun statuton laŭ ĝiaj ĝenerala enhavo kaj spirito, la Iniciatanta Komitato rezignos ĉiun oficon. Ni sekvos, sed ni ne volas stari ĉe la direktilo, se ni konscias, ke la vojo sekvenda ne estas la plej bona.

K-do Mahn (Berlin), devojigas la diskutadon sur temo de propagando poresperanta, instruado, perfektigado, k. t. p.

K-do Révo fine voĉdonigas pri la 1-a artikolo el projekto de la iniciatora komitato. Akceptita kun anstataŭigo de la vortoj «socialismo, komunismo, k. t. p.» per la frazo proponita de la Dresdena antaŭkongreso.

K-do Bannier donas kelkajn klarigojn kaj konsilojn koncerne la kotizon. Li proponas fiksi la jarkotizon laŭ la valoro de unuhora salajro. Akceptita.

Post intervenoj rapidaj de K-doĵ Hermann, Kockeritz, Raŭschenbach, Deübler, Bannier kaj Feit (Zurich), la 2-a punkto estas akceptita.

3-a punkto: anigo. — Laŭ propono de Deübler, oni aldonas al tiu artikolo, ke la membrokarto estos liverata pere de la plej proksima grupo aŭ izolulo. Akceptita kun tiu aldono.

4-a punkto: artikolo 6. — Akceptita.

Same pri la artikoloj rilataj al Komitato Sennacieca. La Kongreso aprobis pluan artikolon prezentitan de Deübler — pri starigo de kontrol-komitato.

Per du grandaj geografiaj kartoĵoj, K-do Bannier klarigis la planon de administraciaj sektoroj de S. A. T. Tio tre interesis la kamaradojn. Estis decidite eldoni skemon de tiu plano.

Antaŭ ol disigi, oni komentas la deklaracion legotan la morgaŭon ĉe la neŭtrala kongreso, por protesti kontraŭ la perfido de S-ro Gervois, kiu malhoneste misuzis leteron de nia K-do Barbusse, destinatan al nia kongreso. Unuanime la kongreso proponas la eksigon el S. A. T. de S-ro Gervois (1).

3-a Kunveno. (3 Aŭgusto 1921). — K-do Révo prezidas. Li malfermas la kunsidon je la 2-a horo.

La debato pri statuto rekomenciĝas je la paragrafo «Kongreso».

K-do Klauber opinias, ke, ĝis kiam daŭros la persekutado de la registaroj kontraŭ ĉiuj proletariaj manifestacioj internaciaj, ni devos ŝirmi niajn kongresojn sub la protektadon de la neŭtrala kongreso. — Kelkaj kamaradoj malsame opinias; eĉ iuj proponas, ke niaj venontaj kongresoj okazu tute aparte kaj aljube de la neŭtrala. Fine estas decidite lasi al komitato, la libereco elekti la daton kaj lokon de la kongreso.

(1) Pri tiu okazeto K-do E. Adam skribis al H. Barbusse, kaj ricevis leteron el kiu ni enpresas la jenon por finfini la aferon: «Mi atestas la ricevon de via letero el Praha. Tute precize mi ne memoras, kio okazis pri Gervois. Sed mi memoras, ke en mia penso la letero, kiun mi donis al li, estis destinata al via kongreso, ne al alia...»

Koncerne la oficialan presorganon, oni akceptis la jenan titolon: « Sennacieca Revuo ». Laŭ propono de K-do Kraml, oni decidis aldoni, kiel subtitolon: *Organo de la Tutmonda Laboristaro*.

K-do *Bannier* skemas la historion de « Esperantista Laboristo », kiu naskiĝis... preskaŭ senmona. Li montras la malfacilecon de la unuaj paŝoj..., kaj la nunajn malfacilaĵojn, kaj financajn embarasojn. Li alpetas ĉies dankemon por la kelkaj kamaradoj kiuj, kvankam proletarioj, subtenis la kason de nia gazeto. Li pravas, per ciferoj, ke pro la kurz-diferencoj la abonpago estas nesufiĉa por pagi nian presiston; kaj ke nur la oferemo de la kamaradoj permesos daŭrigi la eldonadon. Li varme admonas, por ke ĉie, oni lektu monon por nia gazeto.

K-do *Kraml* opinias, ke estus bone kunigi en unu ciferon la abonon kaj la kotizon.

K-do *Bannier* sciigas, ke tiu procedo postulos transformadon de la kalkuloj, ĉar ĝis nun la kaso de la Asocio estas aparta de tiu de la gazeto. Tamen tio ne estas neebla.

K-do *Révo* aprobas kaj diras, ke la gazeto estas tre subteninda: bone redaktata, bone presata kaj preskaŭ tute sen preseraroj.

La propono de K-do *Kraml* estas akceptita principe. Ties aplikado estas lasita al komisiono administracia.

K-do *Kolev* plendas, ke en la gazeto kelkfoje aperis artikoloj ne tre radikalaj, ekz. tiuj de S-ro *Krestanov* pri Bulgario.

K-do *Kockeritz* diras, ke la redaktoro devus klarigi per piedpaĝa noto la neologismojn trovigantajn en artikoloj.

K-do *Adam* respondas, ke li persone deziras, ke la gazetu estu tre radikala, sed li konsideras sin morale devigata akcepti ĉiujn nuancojn de la proletaria laboristaro. Estas nun neeble viviĝi pure komunistan gazeton. Ni do estu, kiel Lenin cetere, iaforte oportunistoj. Li tute konsentas kun K-do *Kockeritz* kaj aldonas, ke lia sintenado pri la lingva afero estas lasi liberecon al la verkantoj. La vivo mem — kaj nur la vivo — povas solvi la demandojn pri evoluo aŭ ŝtoniĝo de nia lingvo.

La ceteraj artikoloj el la projekto estas aprobataj. Partoprenis en la diskutado K-do *Komanin* (Rumanio), *Hugot* (Troyes), *Alterman* (Dresden), *Stribrsky* (Kladno), k. a.

Tiumomente F-ino *Mary Riley* (London), petas la parolon. Ŝi deturnas la ĉies atentemon per longa deklaro pacifista; ŝi pretendas, ke, por « mortigi militon », sufiĉas rifuzi la soldatservon.

K-do *Révo*, per flua kaj elokventa respondo, pravas, ke tiu rimedo donus kontraŭan rezultaton.

K-do *Kockeritz* proponas sendi simpatian telegramon al K-do *Barbusse*. K-do *Adam* dankan telegramon al E. S. K. I. (komunista sekcio esperantista en Rusio) responde al ĝia salutletero. Ambaŭ proponoj akceptitaj.

Ĉar la tuta tagordo estas elĉerpita, K-do *Prezidanto* legas projekton de rezolucio redaktitan de K-do *Adam*.

Tiu rezolucio estas unuanime aprobatata. (Ni ĝin presigas sube).

K-do *Révo* invitas ĉiujn partopreni amase tiuvespere grandan manifestadon komunistan, kies profito estos por la malsataj Rusoj.

Fine, *Prezidanto* varme dankas la kongresanojn, kaj esprimas la deziron, ke, de nun, ĉiu, en sia medio, kontribuos pleje al disvastiĝo, plifortigo de nia *Sennacieca Asocio Tutmonda*. Finita estas la unua kongreso de S. A. T.

La Satanoj disiĝas kontente..., tamen antaŭ la pordo unua danĝero ilin minacas: oni ilin fotografpafas!!

Laŭ la notoj de K-do *JAR. PETR.*

Rezolucio:

I

KONSIDERANTE, unuaflanke:

- a) Ke nur per faktoj ni sukcesos vekii veran intereson pri esp-o ĉe niaj klasbatalaj organizaĵoj;
- b) Ke la sperto jam montris, ke U. E. A. estas la sola organizaĵo, kiu en la praktiko montriĝis fruktodona;
- c) Sed, ke ĝia politika neŭtraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletaria kampo.

II

KONSIDERANTE, duaflanke:

- a) Ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizaĵoj;
- b) Ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esp-o — ĉu pastroj, ĉu anarkiistoj, ĉu policanoj — arigu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizaĵoj, arigu en unu solan Asocion por montri al la Proletariaro, per imponaj faktoj, kiom utilige estas esp-o por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo.

III

KONSIDERANTE, triaflanke:

- a) Ke la kunlaborado kun la t. n. burĝaj esperantistoj povas per tia kompromiso nur malutili al nia propagando;
 - b) Ke jam multaj faktoj montras klare, ke niaj klasaj kontraŭuloj tute ne deziras, ke esp-o disvastiĝu en niaj proletariaj rondoj;
- Pro la ĉi-supre diritaj motivoj, la 1-a Kongreso de S. A. T., Konfesas, ke oni devas profiti je la sperto jam farita ĉe la neŭtrala Asocio U. E. A.;
- Deklaras, ke nur je teknika vidpunkto nia Asocio povas kontakti kun aliaj esperantistaj asocioj;
- Petegas ĉiujn klaskonsciajn batalantojn, ke ili dediĉu sian tutan energion al kreskado de la unua klasbatala Asocio tutmonda;

Sendas al ĉiuj esperantistaj proletarioj sian elkoran saluton, kaj petas, ke ili anigu la Asocion, por ke, per komuna, frata kaj sindonema kunlaborado, ni metu, kiel eble plej rapide en la manojn de ĉiuj proletarioj la ilon, kiu permesos al ili la forrenversiĝon de la lingvaj baroj.

FOR LA HIPOKRITAN NEŬTRALISMON, FOR LA KAPITALISMON, VIVU S. A. T.!

Internacia Antaŭkongreso de Laboristaj Esperantistoj en Dresden

28-29 Julio 1921

K-do *Köckeritz*, prezidanto de la Dresdena laborista grupo, malfermas la Kongreson. Post legado de salutleteroj senditaj el Francio, Norvegio, Svedio, Aŭstrio kaj Anglio, oni akceptis la jenan tagordon: 1. Argumentado pri la neceso de sennacieca Internacio. Oratoro K-do L. Révo. — 2. Diskutado pri la regularo de tia organizaĵo. — 3. Diversaĵoj.

Kiel egalrajtajn prezidantojn oni elektis K-don *Guihéneuf* (Paris), kaj K-don *Köckeritz* (Dresden); kiel sekretariojn: J. Roth (Frankfurt-a-M.), kaj J. Goldstein (Dresden). Laŭ propono de K-do Roth, estis decidite forsendi saluttelegramon al la internacia socialista junulara kongreso en Bielefeld. K-do *Räuschenbach* proponas K-don *Mehlhorn* (nun enkarcerigita pro politikaj motivoj), kiel honoran prezidanton. Tiu propono estas unuvoĉe akceptata. Post diskuto de diversaj aliaj aferoj, la unua kunsido finis je la 5-a.

La 29. Julio, je la 10-a matene, malfermo de la dua kunsido. Anoncis sian alvenon K-do D-ro *Klaüber*, oficiala delegito de la Centra Komitato de la komunisto partio de Germanio. Lia ĉesto en Dresdeno kaj poste Praha, montras, ke la germana komunisto partio havas grandan intereson pri la disvastiĝo de esp. en la laboristaro tutmonda.

K-do L. Révo komencas sian referaton pri la 1-a tagordopunkto. Li parolis tiel konvinkante, ke post la fino de sia 1/2-hora parolado neniu deziris paroli en la diskutado.

Diskutado pri la projekto de statutoj proponitaj de Pariza Centra Komitato. Aprobo kun kelkaj malgrandaj modifoj.

Poste kelkaj K-do *protestas* kontraŭ la forreŝto de la ĉefestraro de G. L. E. A. K-do *Révo*, *Lerchner*, *Keller* kaj *Roth* estas elektitaj por ellabori rezolucion, kiu post la tagmango estis unuvoĉe akceptata. Jen la teksto:

I. — Konsiderante, ke per la progresanta disvastiĝo de esp-o, la klasa kontrasto de la kapitalista socio ankaŭ eniĝis en la esp-an movadon; konsiderante, ke la faktoj pravis, ke

la burĝaj esp-istoj neniel povas helpi por propagandi esp-on en niaj klasbatalaj organizaĵoj; konsiderante, ke la disvastigo de esp-o en la posedantaj kaj trouzantaj klasoj neniel utilas la klasajn celojn de la proletario.

II. — Konsiderante, ke esp-o povas esti nur ilo, uzata por bonaj aŭ malbonaj celoj; ke la esp-a movado estos profitdona nur se ĝi staras sur du fakorganizaĵoj: *porvarba* kaj *porpraktika*. Konsiderante, ke la uzo de esp-o forte akcelas la proletarian movadon por la fina liberigo de la laborista klaso. La Dresdena kunsido de esp-istaj laboristoj aprobas la statutojn de S. A. T., kies celo estas utiligi esp-on praktike por la klasaj celoj de laboristaro tutmonda.

La germanaj ĉeestantaj delegitoj, reprezentante la duonon de la Glea-membroj, esprimas sian surprizon, ke tiel mal multe da grupoj estis oficiale reprezentataj je la Internacia Antaŭkongreso en Dresdeno; plue, ili protestas kontraŭ la neĉesto de iu delegito de la ĉefestraro de l' Glea, je la labor-kunsidoj, kie la projekto de la Glea, koncerne internacian organizaĵon, trovis nur unuvoĉan malaprob.

Samtempe ni mallaŭdas la partoprenon de esp-taj laboristoj je la burĝa aranĝo, sub la malnova monarkia standardo.

PROTOKOLINTO: JEAN ROTH.

LA XIII^a KONGRESO

Ĉu vere la vorto *Kongreso* taŭgas por signifi tian okazintajon? *Esp. Triumfonta* nomis ĝin « Mondfesto ». Pli ĝuste! La plejmulto el la ĉeestantoj pli aspektis, kiel festantoj, amuzemuloj, ol kiel kongresanoj. Sed ni respektu la tradicion — ĉiurilate — kaj diru, ke la XIII-a Kongreso estis plej sukcesa. El 35 landoj aliĝis 2,561 personoj. El ĉi-tiuj proksimume 400 ne petis persone kongresdokumentojn. Do, nur 2.200 efektive partoprenis.

Nediskuteble tiuj « kongresanoj » reprezentas la eliton (eminentularon) de la Esperantistaro. Jam pruvite estas, ke nur personoj havantaj sufiĉe da mono kaj tempo indas ĉesti kongreson.

Loko mankas por raporti detale. Ĉu bedaŭrinde? Ne. Sufiĉas diri, ke diverspecaj oficialuloj sin konkure kaj solene interflatis. Ĉeestis S-ro R. Horner, sendito de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco; D-ro Nitobe, ĝenerala vicsekretario de la Ligo de la Nacioj; S-ro A. Blumel, oficiala reprezentanto de la Internacia Labor-Oficejo; D-ro Ed. Beneš, Ĉeĥoslovaka Ministro por eksteraj aferoj kaj eble aliaj *ejusdem farinae* — ne enkalkulante la kutimajn esp. oficialulojn.

Salutoj. Paroloj. Tostoj. Gratuloj. Honorleviĝoj. Dankoj. Aplauĉoj. Vana bruado... Jen la tuta kongreso!

Tamen mi ne forgesu diri, ke la *Koncerto* estis vere mirinda, la *Teatraĵo* plej sukcesa, la *Internacia kostumbalo* vera artaĵo el plej delikata gusto, la *Solena diservo* plejege edifa kaj sanktiga, la *Ekskurso* entute ripoziga kaj neniam forgesebla, la *Labor-kunsidoj* grandamase vizitataj, la esp. aŭguroj treege solenaj. Unuvorte, ĉio estas en perfekta ordo en la iluziplena imperio esperantista.

OBSERVANTO.

GRAVA AVIZO

La Kamaradoj bonvolu neniam forgesi, ke la Redaktoro zorgas pri la gazeto tute senpage, — malpage estus eble pli ĝuste! — kaj nur dum siaj liberaj horoj. Estas nepre necese, ke oni helpu lin jenmaniere:

1-e Ĉiu artikolo aŭ komunikaĵo devas esti tre legeble skribita kaj nur sur unu sola flanko de la folio;

2-e La Kamaradoj, kiuj ne estas tute certaj pri la korekto de siaj skribaĵoj, bonvolu prizorgi larĝajn marĝenon kaj interpacon;

3-e La korespondantoj neniam forgesu ripeti sian adreson en ĉiu letero.

Legu atente « Inter ni » ĉe la paĝo 7

Vojaĝ-Kongresimpresoj kaj Rimarkoj

PARIS-BERLIN

23 Julio. — Kelkfoje mi aŭdis, ke por fariĝi vera esperantisto estas necese, ke oni ĉeestu internacian kongreson. Tie blovas vento de frateco; tie oni enspiras aeron purigitan je ĉia nacieco; tie regas harmonio; tie vivas « nova sento ». Do, ekvojaĝante al la XIII-a, mi estas kvazaŭ en spiritstato de mezepoka kavaliro antaŭ sia solena konsekrado; aŭ eble en tiu de pilgrimanto al iu sankta miraklejo. Ĉu do en Praha mi akiros la taŭgan kuracilon por mia skeptikeca malsano? Ĉu tie mi sentos, ke ĉiuj esperantistoj estas pioniroj de granda ideo? Ĉu la disĉiploj konservas la veran spiriton de la Majstro?...

La vagonaro forkuras en la nokto... al Berlin!... Kaj tiuj du vortoj rememorigas al mi, ke antaŭ 7 jaroj, soldatoj ebriaj de patriotismo kaj vino kriacadis ankaŭ: Al Berlin!... Al Berlin! Dume, tie, same frenezaj patriotoj kriacadis: Al Paris!... Al Paris!...

Nu, morgaŭ mi estos en la ĉefurbo de Germanio, kaj min tie fratece atendas kamaradoj. Ĉu vere?... Rapidas, rapidegas la vagonaro. Kadenca estas la irado. Dormeme revante, mi havas la impreson, ke monstra besto trakuras la kamparon kaj la urbojn. Malĝoje fajfante ĝi de tempo al tempo vekas kaj timigas la pacajn enloĝantojn.

Tagiĝas. Jam mi transpasis la landlimon de Belgio. Ĉe la vagona fenestro mi rigardas la kampojn, la domojn. Ĉio aspektas, kiel en Francio.

Baldaŭ mi estos en Germanio... Nu, jam mi estas. La vagonaro haltas, kaj jen, aŭdiĝas lingvo, kiun mi ne komprenas. Tamen mi ne vidis landlimon nek sur la ĉielo, nek sur la tero. Sed nun, mi ekkonscias, ke mi estas en fremda lando, ĉar mi ne sukcesas legi la murajn surskribojn. La lingva diferenco estas efektive natura baro inter la popoloj.

La vagonaro daŭrigas sian kuradon tra kampoj, traŝ riveroj kaj urboj. Grandegaj kamentuboj vidiĝas: Ni trapasas industriajn regionojn. Tie ŝvite penadas laboristoj por gajni pecon da pano kaj riĉigi la fabriktoposedantojn. Tie oni grandkvante konstruis ĉiuspecajn mortigilojn... kaj sinsekve kampoj, urboj formalaperadas. La rigardado fariĝas teduntona, seninteresa.

— Jes ja, ĉio aspektas, kiel en Francio, diras K-do Guihèneuf, kiu kunvojaĝas al la Kongreso.

Berlin! *Friedrichs Bahnhof*. Ni elvagoniĝas. Sur la kajo atendas nin K-do L. Révo, korespondanto de la Pariza komunista gazeto « L'Humanité », lia edzino kaj kelkaj aliaj samideanoj. Esperanto sonas. Ni ne estas en fremda lando.

25. — Karavano de 91 Svedoj (el kiuj nur 25 parolas esp-on) alvenis en la urbo. Jam ankaŭ ĉeestas Finnoj, Ruso (el la blanka, Wrangela Rusio, kion tiu S-ro ne forgesas sciigi), Angloj, Belgoj, Ĉeĥoslovakoj, Holandanoj, k.a. Vespere la Berlinaj esp-istoj akceptos ilin ĉe la restoracio *Wilhelmhof*. Nu, mi ĉeestu. Tiel mi jam povos sperti, kia spiritstato regos en tiu internacia kunveno.

Jen la estro de la karavano parolas: Li gloras sian nacian kaj fieras pro tio, ke la svedoj estos la plimultnombraj en Praha, post la ĉeĥoj. Finante sian parolon, li petas la ĉeestantojn, ke ili levigu kaj laŭtege krii: « Hho! », je la honoro de Svedio. Poste, sama krio aŭdiĝas honore al Germanio.

Post tiuj naciemaj, preskaŭ sovaĝaj krioj, mi tuj konscias, kiom malproksime mi estas de tiaj esp-istoj.

Sonas la fortepiano. Ekstariĝo de la ĉeestantoj. Ili kantas la *Espero*. K-do Sproech, el la Berlina laborista grupo, Guihèneuf kaj mi, ni restas sidantaj. Skandalo. Iu S-ro de-

mandas min, kial mi ne ekstarigas. Mi devas klarigi, ke mi ne estas ritemulo; kaj tia ekstarigo estas rite religieca. Tre certe la nudkapaj starantoj same ekstarigas, kiam ili aŭdas sian nacian himnon. Ili ankaŭ senĉapeligas, kiam regimento de ilia nacio preterpasas kun sia standardo. Ni ne faru el esp-o novan partion, novan religion. Ni kutimigu la homojn pensi kaj agi racie, objektivaj kaj ne religieca.

26. — Desegno ankaŭ estas internacia lingvo. Helpe de plano estas facile sin direkti en iu ajn urbo. Kaj promenante sur la stratoj oni tute ne aspektas kiel fremdulo. Dufoje, hodiaŭ, mi spertis tion, ĉar okazis, ke preterpasantoj petis al mi sciigojn. Mirigite, ili deiris aŭdante: « Mi ne komprenas ».

La urbon mi ne intencas priskribi. Estu dirite nur, ke, krom la *Sieges Allee* (Aleo de la Venko), mi vidis nenion vere vidindan.

Vespere la neŭtrala esp. grupo organizas oficialan akcepton en *Rathaus* (Magistratdomo). Ankoraŭ unufojon, mi esploru la spiritan atmosferon.

La ĉambro estas plenplena. Je la nomo de la Berlina grupo parolas ekskapitano Gube; poste urba konsilanto Wege (reakciulo, diras al mi K-do Sproech, el la lab. grupo, kiu sidas apud mi), kiel reprezentanto de la urbo. S-ro W. Mann (anglo), parolas germane pri esp-o kiel kulturilo; poste lerneja urbkonsilanto Engel. Kaj jen Svedo, Anglo, Belgo, Bulgaro, Ĉeĥo, Dano, Dancigano, Finnlandano, Latvo, Norvego, Polo, Ruso, venas laŭvice saluti je la nomo de sia respektiva nacio. Tio estas teda, vere ridinda.

Petite paroli kiel Franco, mi rifuzis: 1-e ĉar mi estas kaj volas resti *sennaciulo*; 2-e ĉar la Esp. lab. grupo Berlina ne oficiale partoprenas en tiu manifestado; 3-e ĉar mi tute ne emas paroli. Prijuĝante laŭ la mirigita mieno de la petanto, kredeble neniam li vidis tian strangulon kiel min!...

Nu, mi ne bezonis iri ĝis Praha por sperti, ke en la esperantistaron ne venis « nova sento ». Ĉe la I-a Kongreso, Zamenhof diris, ke: *unuan fojon en homa historio ni, membroj de plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia, ne kiel fremduloj, sed kiel fratoj, ĉar hodiaŭ kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj!* Kompatinda Majstro. Hodiaŭ kunvenas Svedoj kun Germanoj, Angloj kun Belgoj, k. t. p.

Samkiel Kristo tre certe ne rekonis siajn disĉiplojn en la plimulto de la nunaj pastroj, Zamenhof ankaŭ ne rekonis siajn en la plimulto de la nunaj esp-istoj. La « interna ideo », la « nova sento », tio estas nia internaciismo, nia sennaciismo. Nur ni, sennaciuloj, prave povas ŝati nin, kiel fidelajn daŭrigantojn de la penso Zamenhofa.

DRESDEN

27. — Ĉe la stacidomo flirtas verdaj standardoj. Jen policisto kun verda stelo sur la brako. En perfekta esp-o li sciigas nin pri la vojo. Teretaĝe vidiĝas: *Polica informejo por esperantistoj*. Ni direktiĝas tien kaj dekstre... ekvidas grandan blasonon kun surskribo: *Liberiga Stelo*. Tie atendas nin laboristaj esp-istoj. Interkonatiĝo kaj komuna veturado al la *Popoldomo*. Tie troviĝas aliaj germ. kamaradoj, kaj ĉiuj plej frate kaj kortuŝantmaniere akceptas nin. Ĉio estas bone prizorgita.

La Popoldomo, vasta konstruaĵo, estas la proprajo de la laboristoj. Tie ili sentas sin kvazaŭ hejme. Oni povas manĝi, trinki, legi gazetojn, kaj la servistoj bonkamarade klopodas por kontentigi la gastojn. Tie okazos la Antaŭkongreso.

28. *Matene*. — Anstataŭ laŭprograme viziti la vidindaĵojn de la urbo, mi maltrafe iras ĉe la Akceptejon de la burĝa kongreso. Tio kostos al mi 110 markojn!... Tie deĵoras afabla kaj helpema ĉefpolicisto, S-ro Pohle. Ĉar jam skribe li ri-

proĉis al mi, ke en la gazeto oni ne ĝentile parolas pri la policistoj, li sendube volas montri, ke oni estas malprava, ke policistoj estas plej bezonaj homoj. Li do tre afable sciigas min, ke la pasportoj devas esti vizataj. Liverinte la dokumenton kaj paginte 10 markojn, mi ekscias, ke nur morgaŭ mi rehavos ĝin. — Rakontante la okazintaĵojn laŭ estanta maniero, mi antaŭdiru, ke la morgaŭon, oni postulis ankoraŭ 100 markojn por ricevi mian pasporton. El tio mi konkludas, ke estas ĉiam malbone iel ajn rilati kun policistoj, ĉar la kamaradoj, kies pasporto ne estis vizata en Dresden spertis pro tio nenian malagrablaĵon — kaj ili ŝparis 110 markojn.

Posttagmeze, kongresa kunsido; *vespere*, akceptvespero. — Kantado, muziko, laŭtlegado, parolado, prezentado. La programo estas ampleksa kaj mi estas tiel laca, ke mi ne povas, kiel decus, ĝui la amuzaĵojn bone prizorgitajn de niaj Dresdenaj kamaradoj.

29. — Laborkunsidoj. Pri la Kongreso mem, oni legu aliloke. *Vespere*, propagandkunveno. La plej granda ĉambro de la Popoldomo estas plenplena, K-doĵ Jean Roth, Alles kaj aliaj parolas germane. La plej amuza kaj trafa afero estis, ke K-do Révo, kiu estras la germanan, tamen parolas esperante, je la granda miro de la ĉeestantaro, kiu konstatas, ke esp-o estas vivanta lingvo per kiu oni povas elokvente paroli. K-do Kläuber tradukas germanen. Granda sukceso por esp-o. Fine de la kunveno multaj ĉeestantoj enskribigas sin por la venontaj kursoj.

Kontentigite pri tiu rezultato niaj Dresdenaj K-doĵ plendas, ke ili ne havos sufiĉe da profesoroj por gvidi ĉiujn bezonatajn kursojn. Ili sin turnu al la burĝoj! Eble inter ĉi-tiuj troviĝos bonvoluloj. Tio ne estas kunlaborado. Kontraŭe, la laboristoj devas kvazaŭ ŝtele akiri kleron de siaj klasaj kontraŭuloj. For la skrupuloj!... Sklavo ĉiam rajtas perfidi siajn sklavigantojn.

PRAHA

30. — De Dresden al la urbo de la XIII-a ne tro longa, sufiĉe agrabla estas la vojaĝo. Bela pejzaĝo. Tre alloga estas la « Saksa Svisio », kiun ni transiras.

Praha! Jam ni staras ĉe la stacidomo. Tuj ni ĉiuj havas la impreson, ke la organizado ne estas tiel bona, kiel en Dresden. Longa atendado. Interpuŝiĝoj. La esperantista amaso similas ĉiujn aliajn amasojn. Neniu « Satano » vidiĝas por akcepti nin. Tie oni kunlaboras, tie proletarioj sendube forzas sian energion profite al siaj klasaj kontraŭuloj...

La Akceptejo troviĝas sur la insulo *Zofin*. Jam vesperigas. Lumoj ekbriletas ĉiuflanke. Vigla vivo regas ĉi-tie. En la ĝardeno, en la salonoj, ĉie gastoj sidas ĉe tabloj, mangas, trinkas, babilas. Muziko. Jam mi renkontis kelkajn korespondantojn miajn el Rumanio, Hungario, Ĉeĥoslovakio. Ĉiuj sieĝas min. Unu el la sieĝantojn, K-do Stribrsky, per sia persistemo sukcesas ricevi promeson, ke morgaŭ matene, mi iros en lian urbon *Kladno*. « Tie, li diras, vi vidos grandegan demonstracion de gimnastikistoj, ĉiuj komunistoj. Vi certe ne bedaŭros pri la vojaĝo. Kredeble neniam vi vidis tian imponan spektaklon ».

Nu, mi do ne ĉeestos la solenan malfermon de la Kongreso; mi ne ĝuos la elokventecon kaj diplomatan lertecon de S-ro Privat; mi ne povos admire rigardadi la esp. eminentularon en oficiala funkciado. Mi iros al la komunistoj!...

(*Daŭrigota*).

E. A.

Surporti verdan stelon ne sufiĉas por esti vera esperantisto. Ni ellernu la lingvon.

Inter ni

Eble kelkaj legantoj miros, ricevante sian gazeton kun nova titolo. Ilia miro ankaŭ estos granda konstatante, ke la redaktora ofico estas plenumata de nekonatulo. Kial ĉio tio-ĉi okazis?

La ŝanĝo de l'titolo estis decidata ĉe la Kongreso en Praha, kaj pro diversaj motivoj K-do E. Adam devis transdoni la redaktoran oficon al sia plej bona amiko E. Lanty. Krom tio, nenio estas ŝanĝita en la mastrumado de nia entrepreno. La legantoj, kiuj kelkfoje gratulis kaj kuraĝigis K-don E. Adam, povas esti tute trankvilaj rilate al la nova redaktoro. Ĉi-lastaj ĉiurilate profitos la sperton jam faritan de sia antaŭulo — kiu, cetere, loĝas ĉe la sama n^o de la sama strato kaj tiel ĉiam povos helpi kaj konsili, se necese. Do, la legantoj dormu trankvile, aŭ pli bone ili aŭskultu alian voĉon, tiun de la Administracio.

LA REDAKCIO.

* *

La financa situacio de nia presorgano fariĝas pli kaj pli perea. Jam, en Junia N^o, per ciferoj ni avertis la legantaron pri tiu danĝero.

Ĉu ĉiuj kamaradoj sentis la varmecon de tiu alvoko? Ne, verŝajne, ĉar ties rezultato estas afliktiga: malmulte da mono falis en nian kason. Ho, jes! la vortaj kuraĝigoj ne mankas; sed tiu Platona helpo ne sufiĉas.

Nenio estas havebla senofere. Ĉu estas vere, ke la plejmulto el la abonantoj ne povas tempe al tempe allasi kelke da frankoj, markoj, ŝilingoj, k. t. p.? Tion ni ne kredas; sed bedaŭrinde, tro da el ili atendas la geston de la najbaro — ŝajne pli riĉa — antaŭ ol komenci sian. Tiu malsukcesa sperto nin kondukas al nova metodo kiu, esperinde, savos nian gazeton.

Por ke nia organo estu vere interesa, por ke ĝi riprezentu digne nian S. A. T., por ke ĝi plenumu sian taskon, estas absolute necese, ke ĝi aperu almenaŭ ĉiumonate, kaj almenaŭ 16-paĝe. Jupli multpaĝa, despli propagandvalora.

Nu! eĉ por gazeto nur 16-paĝa, nia abontarifo ne sufiĉas. Ni devas tute modifi tiun tarifon. En Junio, ni demonstris ke 12 numeroj (jarabono) 16-paĝaj kostas al ni 9 francajn frankojn, inkluzive la administraciajn kaj poŝtajn elspezojn. Konsekvence, niaj Franciaj legantoj devos pagi 9 fr. fr. po-jare.

Laŭ fidindaj statistikoj 9 fr. fr. reprezentas en Francio la salajron mezan de 3 1/2 laborhoroj. Do! ni prenu tiun ciferon kiel bazon, kaj postulu de ĉiu ajn leganto la saman oferon: la jarabonprezo estos ĉie egala je la meza salajro de 3 1/2 laborhoroj. Tiamaniere, la oferdono estos sampeza por ĉiuj, same proporcia je la diversaj salajroj.

Laŭ tiu principo ni arangis novan abontabelon (vidi sur la unua paĝo). Ni difinis la abonojn laŭ la salajro-ciferoj donitaj de multaj S. A. T.-anoj, responde al nia cirkulero.

* *

Tiu nova tarifo donos plenan rezultaton, nur kiam ĉiuj kamaradoj estos renovigintaj sian abonon. Ĝis tiam ni bezonas monon: nia rubriko « municioj » estas malfermata por ĉiuj.

* *

Ni rememorigas, ke alia rimedo por helpi, estas mendi ĉiujn viajn librojn ĉe nia librejo: K-do L. Glodeau, 177, rue de Bagnolet, Paris XX^e (Petu katalogon).

LA ADMINISTRACIO.

Municioj ricevitaj por E. L. (de 1. Julio ĝis 30 Septembro). — Belgio: Van Aelst, 1 fr. 50. — Cuba: Mariano Rosa, 10 fr. — Francio: Raguier, 2 fr.; Micard, 1 fr.; Bioulet, 4 fr. 50; G. Aulagner, 4 fr. 50; Esp. Revol. grupo, Puteaux, 10 fr.; A. Marie, 1 fr. 50; H. Guillaume, 4 fr. 50; L. Guillaume, 4 fr.; Calinaud, 4 fr. 50; Egagé, 1 fr. 50, E. Bouchard, 4 fr. 50; Mi-

gny, 4 fr. 50; Ley Robert, 9 fr. 50; Aubry, 4 fr. 50; Gilbert, 1 fr. 50; Spindler, 3 fr.; Glodeau, 15 fr.; Satano, 15 fr.; Adam, 300 fr.; Couraud, 4 fr. 50; Dufau, 4 fr. 50; Olzanski, 4 fr. 50; S-ino Balesme, 1 fr. 50; Estour, 4 fr. 50. — Hispanio: Astigos, 7 fr. — Japanio: Kunitaro Fukuta, 10 fr. — Svisio: Humberset, 10 fr.; Pegrenoud, 2 fr. 35. — Germanio: Lehrner, 20 Mk. G.; Emmerich, 10 Mk. G. — SUME: 453 fr. 85 + 30 Mk. G.

Restas ankoraŭ kelkaj n-roj (Julio-Aŭgusto) de L. E., el luksa papero, kun portreto de H. Barbusse, po 2 fr. fr.

Aĉetante tiun n-ron, vi helpas la vivon de Sennacieca Revuo. Petu ĝin al K-do Glodeau, 177, rue de Bagnolet, Paris-XX^e.

NOTOJ

Kontraŭ la militkrimuloj!

La tuta germana gazetaro klaĉadas pri la franca ofico *Matis* kies agojn konigis fame konata S-ano *Henri Barbusse* en « L'Humanité ». *Matis* lasis mortigi 180 germanajn militkaptitojn. La tuta gazetaro, ĉu revoluciema, aŭ reakcia, ĝojegas pri la ago de nia Esperanta amiko Barbusse. La « Leipziger Volkszeitung » (socialista gazeto) skribas komente pri tio:

« La francaj proletarioj plenumas sian devon. Same tiel devas agi la germanaj laboristoj. La naciema gazetaro kun ĝojo citas la kulpigon kontraŭ francaj militkrimuloj dume ĝi protektas la germanajn militkrimulojn. »

Ni Esperantistoj propagandu, ke ĉiulande estiĝu la atako kontraŭ la samlandaj militkrimuloj. Kiu volas ataki kontraŭ la ĉiulandaj malamikoj, devas antaŭe ataki kontraŭ naciaj malamikoj.

H.

La plej mallonga rakonto por ĉiu laboristo

La kapitalistoj disdonas la poziciojn al tiuj, kiujn ili favoras kaj diktas la salajrojn; ili posedas siajn proprajn domojn kaj ankaŭ tiujn, en kiuj loĝas laboristoj, por kiuj lastaj ili diktas la loĝojn; en iliaj manoj troviĝas la mangajoj kaj diktas la prezojn por tiaj; ili posedas la preson kaj per ĝi formulas la konvinkojn por sia amikaro kaj por la senkonsciaj laboristoj; ili estas la superestroj de la registaro, kiu devas fari leĝojn favorajn por ili; ili posedas la naciajn lernejojn tial la instruistaro estas devigata instrui la lernantaron honori ilin; ili donas la monon por konstrui la preĝejojn tial la pastroj devas kontraŭi ĉian penson de renverso. Jes, per la lernejo kaj preĝejo, ili posedas la menson kaj animon de la laborista mondo.

Ĉiu knabo aŭ knabino lernas ion el pli longa rakonto, ol tiu ĉi, en la lernejo. Nun, kion vi povis lerni el tiu ĉi rakonto, kiu estas la plej mallonga?

NOVULO.

Rimarkinda okazintaĵo

En Germanio, la « lando de la pensemoj kaj poetoj », okazas unu malsaĝaĵo kaj friponaĵo post alia. En la urbo Königsberg antaŭ mallonga tempo okazis soleno, kiel memorigo al la militbatalado ĉe Tannenberg, dum kiu multaj rusaj soldatoj mizerege pereis en la tieaj marĉoj. Kaŭze de la citita soleno la Königsberg-a universitato proklamis la fifaman generalon *Ludendorff* kiel « honordoktoro-n de la medicino ». Ĉiu certe estas scivola pri la motivo de tia malsaĝa aŭ fripona fiago de la koncerna « scienca instituto ». Logike la motivo estas laŭ la ideoj de la germana reakciemularo. Sur la « honordoktor diplomo » estas skribite:

« Por la majstro de la militarto, por kies eminenta povo estas savita la sano kaj vivo al sennombraj militistoj germanaj

kontraŭ malamikaj mortigiloj — por la liberiginto, kiu per fereca mano purigis la prusan hejmlandon de rusaj bandoj rabintaj kaj bruligintaj — por le gvidanto, per kies forta brako la senmakula gloro de la germana armilaro estas portita de Atlanta oceano ĝis la arabaj dezertoj — por la heroo, kiu per akraj batoj de sia nevenkebla glavo ŝirmis la germanan popolon ĉirkaŭrampitan de avidemaj malamikoj, ĝis ĝi, konfidante al malveraj paroloj, malkonfidis al sia nerompebla defendo kaj gvidantaro — por la germana viro, kies bildo eklumanta el la mallumo de la estanta tempo donas al ni la kredon al iama savonto kaj venĝonto ! »

Estas vere ne necese aldoni komentare eĉ unu vorton al tia motivo, sed ĝi estas la tipa pruvo, ke la koncernaj scienculoj absolute ne estas tiaj, kiujn bezonas la nuntempa mondŝtato. Similaj « samideanoj » kaj Ludendorfanaj trovigaj ĉiulande, sed esperinde ne tiom, kiel en Germanio. Ni laboristoj ĉiulande batalu kontraŭ tiaj samlandaj friponoj !

Germania DUBAPTITO.

Por la malsatanta rusa popolo

Ni ricevis de « Tutruslanda Esperantista Unuiĝo de Helpo al Malsatantoj » (Adreso : Italjanskaja n-ro 31, Petrograd) insistan kaj kortuŝantan alvokon, bedaŭrinde tro longan por ke ni povu ĝin enpresi. Cetere jam ĉiuj konas la teruran situacion en kiu baraktas niaj rusaj fratoj, kaŭze de la krima blokado de « Entento » kaj de granda sekeco.

De nia K-do Jean Roth ankaŭ ni ricevis varman, samcelan alvokon. Ni do decidis malfermi internacian monokolekton je la nomo de S. A. T. La monon ni sendos al la supre citita Unuiĝo, en kies Prezida Komitato ni legis la nomojn de niaj K-doj V. N. Devjatnin kaj E. Drezen. Tiuj nomoj garantias al ni, ke la sumoj sendotaj estos trafite uzataj.

Do, Kamaradoj ĉiulandaj, sendu vian mondonacon, — eĉ plej malgrandan, — por montri al niaj rusaj fratoj, ke ni simpatias al ili kaj kore partoprenas en iliaj suferoj.

SENNACIECA ASOGIO TUTMONDA
23, rue Boyer, Paris (20^e).

Sumoj jam ricevitaj : Raguier 10, Coldefy 20, Gabory 15, Guihéneuf 20, Laurenc 5, Adam 50, Habert 5, ĉiuj en Paris (sume 125 fr. fr.) — Jean Roth (Frankfurt-a-M.) 20 Mk. g.

Ĉekoslovakianoj ! Atentu !

La Juli-Aŭgusta N^o de « *Esperantista Laboristo* » estas interesega aparte por Vi. Ĝin legu kaj legigu. Restas ĉe mi ankoraŭ kelkdekoj : rapidu ĝin mendi. Sendu 3 kr. 10 hel. po ekzemplero (en registrita letero prefere), al K-do Šilha Ferdinand, U. Karlova 460, Praha II.

Aŭtoro devas ricevi tiel same modeste laŭdojn kaj kritikojn, kiujn oni faras pri liaj verkoj.

LA BRUYÈRE.

La grandega plezuro, kiun oni ĝuas parolante pri si mem, devas igi nin timi, ke ni ne plezurigas la aŭskultantojn.

LA ROCHEFOUCAULD.

Por aĝi prudente ne sufiĉas prudento. — (DOSTOJESKI).



La Angulo de l' Poetoj

Rekomendita de la Esp. Literat. Asocio.

LA INFANO EN LA LULILO

Dediĉita al mia Majstro
Romain Rolland

*En miaj manoj la pezo ne pezas,
En okuloj la spaco ne havas distancojn,
En oreloj tononduoj ne havas longecon
Kaj kunfandiĝas ĉiuj tempoj kaj mezuroj.*

*Ne, antaŭ mi ankoraŭ fariĝas
La giganta Kreado, mi sentas, mi vidas :
Ankoraŭ ne ekzistas pezoj
Nek formoj, nek spaco, nek tempo.*

*Kaj kiel milionoj da mirakloj
Svingiĝas antaŭ mi, de la naturo
Kiel la tonoj, koloroj gustoj
Flugetadas sur senfinaĵ skaloj*

*Kiel ĉio kreigas, detruigas,
Kiel la suno supren kaj malsupreniras,
Kiel fluidiĝas la malmola ŝtono,
Kiel glaciigas la varmega geizir,*

*Kiel mi suferas kaj kiel mi gojas,
Kiel mi amas kaj kiel mi trompiĝas,
Kiel min svingadas sur senfina ŝtuparo
Mia sentado teren kaj ĉielen,*

*Kiel ĉio muzikas kaj murmuras
De « pianissimi » al « fortissimi »,
Kiel ĉiuj koloroj kunfluas
Kiel la tonoj tremige ĉiigas,*

*Kiel mia korpo senfortiĝas, la okuloj
Blindiĝas, la oreloj surdigiĝas, mia
Buŝo kunmiksas la gustojn kaj
Nigra kurteno falas antaŭ mi :*

*Ho mi min sentas tiam ĉi kiel
Senfina infano en senfina lulilo,
Kiun nevidebla mano luladas
Kantante mallaŭte kaj nekompreneble.*

Originalo de ALADARO BÁN.

ESPERANTA MARSELIEZO

1

Ni komencis tutmondan ribelon
Kontraŭ premo de la kapital',
Sur la flago ni havas la stelon
Kaj la sanktan devizon « batal! »

2

Kontraŭ burĝoj, vampiroj sovaĝaj,
Kiuj suĉis la sangon de l'mond',
Ĉiuj niaj amikoj kuragaj
Unuigas fortike en rond',

3

Nun ĉiu kun forta, honesta anim'
La manojn al ni jam etendas!
Nin venko triumfa atendas, —
Antaŭen do, fratoj, antaŭen sen tim'!

4

De l'patrinoj miŝeraj sopiroj,
De l'orfuloj kriado kaj plor',
La ĝemad' de l'sennombraj martiroj
Unuigis minace en ĥor'.

5

Kaj senvartoj de oro idolo,
En palacoj kaŝantaj sin nun',
Ne forkuro de venĝ' de l'popolo,
De severa, kruela mortpun'!

6

Tiel same, kiel N^o 3.

7

Sed milito ne estos konstanta, —
Ĉin altigos de l'paco signal',
Kaj de tiam la mond' esperanta
Tuj revenos al paca batal'.

8

Do dum nuna kruela batalo,
Esperanton konservu memor',
Ĉar sen ĝi Internaciano
Estas korpo potenca sen kor'!

9

Tiel same, kiel N^o 3.

10

Unuigos nur por Esperanto
La tutmonda proletariar',
Kaj de tiam jam tiu ĉi kanto
Estos kanto de l'tuta homar'.

11


Kiam regos la pac' sur la tero
Kaj trankvile brilados la stel',
La milit' kontraŭ homa malklero
La plej sankta per ni estos cel'!

12

Tiel same, kiel N^o 3.

Petrogrado (Rusujo) 1921.

V. N. DEVJATNIN.



Mortigo de Francisko Ferrer

(13-an de Oktobro 1909)

Ĉar la sanktaj libroj skribas
Scienculojn di' malamas,
Pripensadis nigra bando
En Rom-urbo ĉe la papo,
Kiel foje, tiel ree
Pereigi, senkapigi,
Homon, ilin kontraŭontan,
Kiun estos ekkaptonta.

Sed la povo plu ne havas,
Kiel tiam, kiam povis
Bruli vivan Brungordanon,
Ekmortigi Galileon
Kaj aliajn saĝajn kapojn.
La senkulpajn suferantojn
Turmentegis, bruligadis
Aŭ alie mortigadis.

Ĉar sur temp' antikva tiu
Ĉie nur mallum' pezegis,
La popolo blind', senkulpa,
Premegita kaj dolora,
Ĉar senscia, senkonscia,
Ĉie serĉis sian savon,
Fidis al la nigra bando,
Kiu skuis en la lando.

Tim', teruro, regis tiam,
Doloregojn suferadis,
Kiu sin ne eksubigis
Al la band' de l' mortigantoj.
Sur popolo pezis dormo,
Al idoloj sin klinigis:
Al la kruco, bild', preĝejo,
Pastro, reĝo, mallumejo.

Tiel superstiĉ' malsaga
Sub preĝejo kaj sub trono
Subigadis kaj blindigis
La popolon, tage, nokte.

*Kiel kun miĝera besto,
Homan korpon komercaĉas,
Ĝin premeĝas kaj ĝin ligas,
Ĝin tranĉadas kaj pecigas.*



*La preĝej' ĝis nun ne perdis
La potencon, ĉar popolo
Malrapide konvinkigas
Kaj de l' songo vekigadas.
Saga papo tion scias
Kaj pro savo de l'potenco
Sia, li malice revas:
Iu malaperi devas.*

*En la urbo Barcelono
La popolo ekribelas,
Bombojn jetas, pastrojn batas,
Kaj cindrigas la preĝejojn.
Sed heroajn batalantojn
Arestigas, mortigadas,
Kiu sed senkonsciigis
Je mensogoj delogigis.*

*La ĵugisto ekzamenas,
Mezmortanton subigadas,
Falsigadas protokolojn
Kaj aliajn dokumentojn,
Kiuj servas por kaptilo
De la hom' honest', konscia
Kaj amik' de l' libereco,
Vastigant' de l' homameco.*

*Nur je tiaj falsigaĵoj
Kaj aliaj cent trompaĵoj,
Ferreron kondamnis kulpa,
Sendis juĝon al la reĝo.*

*Reĝ' Alfonzo ekridegis
Goje kiel idioto,
Tuj al papo telegrafis,
Ke Ferreron jam mortpafis.*

*Ferrer estiis sciencisto,
Kiu ĉie sukcesadis,
Jam popolo lin komprenis,
Kiel ver' amik' lin tenis,
Batalant' por libereco
Kaj por tuŝ' homar' de l' mondo;
Tio kaŭzis la kaptigon,
Tio kaŭzis la mortigon.*

*La Ferrera sang' ekŝprucis
Kaj disŝprucis en la mondon,
Ĉie sendis fajreretojn,
Kiuj krias por la venĝo
De l' Alfonzo reĝ' fiera,
De l' ĵugist' drakona Maŭro
Kaj por Ezerina kapo,
Ankaŭ tiu de la papo.*

*Aŭdu reĝo, ci Alfonzo,
Stulta Maŭro, kaj Ezerin,
Kaj kun papo vatikano,
Vi krimuloj, mortigantoj!
Libereco vin kondamnas
Kaj scienc' malaperigos;
Etaĵ vi por ili estos,
Juĝ' al ambaŭ fine restos.*

El sudslava tradukis
D. A. KLAĜIN.



Al kuracisto, advokato, profesoro, k. s. oni pagas honorarion; al laboristo salajron. Tiu simpla kvalifika diferenco montras klare kiom da servuteco entenas la vorto laboristo.

**

Laboristo sin gloranta pri sia *isteco* similas sklavon, kiu sin glorus pri sia sklaveco.

**

Ne plu devas ekzisti laboristoj, sed nur laborantoj — labororoj.

**

La emo al uzado de vortaĉoj estas ia dandismo ĉe laboristoj.

SENNACIULO.

LA VIVO DE LA MARTIROJ

La libro tiel titolita aperis dum la milito malmulte post la « La Fajro » de H. Barbusse. Post tiu lasta ĝi estas unu el tiuj, kiuj havis plej grandan sukceson. La verkinto G. Duhamel, kiu samtempe kiel tre ŝatata poeto estas kuracisto, priskribas en ĝi la suferojn de la vunditaj soldatoj, kiujn li kuracis. Estas ili la martiroj kaj efektive el tiuj simplaj rakontoj eliras plej elokventa pledo kontraŭ la milito.

N. de la trad.

MORTO DE MERCIER⁽¹⁾

Mercier mortis, kaj mi vidis lian kadavron ploranta... Mi ne pensis, ke tia afero estus ebla. Oni estis ĵus lavinta lian vizaĝon kaj kombinta liajn grizajn harojn...

Mi al li diris :

— Vi ne estas kvardekjara, malfeliĉa Mercier mia, kaj viaj haroj estas jam preskaŭ blankaj.

— Ĉar mia vivo estis ja tiel maldolĉa kaj mi havis multajn ĉagrenojn. Mi tiel multe kaj tiel multe laboradis. Kaj mi havis tiel malmulte da ŝanco...

Estas doloraj sulketoj sur lia tuta vizaĝo ; mil malsukcesoj lasis tie neforgeseblajn postsignojn. Tamen liaj okuloj senĉese ridetas ; el la velkiĝintaj trajtoj, la okuloj brilegas pro granda naiveco kaj pro tiel pura espero !

— Vi savos min kaj eble mi estos pli feliĉa dum la estonteco.

Mi diras : « Jes ». Kaj mi pensas : « Ve ! Ne ! Ne ! ».

Sed jen subite li vokas min. Granda bistra ringo sulkiĝas ĉirkaŭ la ridetantaj okuloj. Violkolora ŝvito malsekigas lian frunton.

— Venu ! venu, li diras, mi sentas ion teruran. Certe mi tuj mortos.

Ni fervore kliniĝas al la malfeliĉa paralizita korpo. Nur la vizaĝo povas esprimi la angoron. La manoj povas apenaŭ moviĝi sur la littuko. Per la mitralo ĉio alia de lia korpo estis apartigita el la vivigaj fortoj.

Ni fervore ĉirkaŭas lin, sed mi sentas lian koron, kiu ŝanceliĝas, lian buŝon, kiu klopodegas por ekhavi guton, nur guton el la senfina pokalo de la aero.

Iom post iom li liberigas sin el la geheno. Mi divenis, ke la mano faras movon por reteni la mian.

— Restu apud mi, li diras, mi timas...

Mi restas apud li. La ŝvito sekiĝas sur lia frunto. La terura doloro svenas. La aero denove fluas tra la malfeliĉa brusto. La milda rigardo ne ĉesis rideti.

— Vi tamen savos min, li diras ; mi havis vivon tro malfeliĉan por morti jam, ĉu ne, Sinjoro ?

Mi premas lian manon por havigi al li fidon, kaj mi sentas, ke lia maldolĉa mano estas feliĉa en mia. Mi metis miajn fingrojn en lian karnon, lia sango fluis sur miaj fingroj, tio sufiĉas por krei fortajn ligilojn inter homoj.

La kvieteco ŝajnas tute reveninta. Mi al li parolas pri lia bela lando. Li estis panisto en ia vilaĝo de l'Cantal⁽²⁾. Mi tie pasis, antaŭe... vojaĝante je la tempo

de l'paco. Ni kune memoras pri laodoro de la juniperoj, dum la someraj tagoj, sur la verdaj deklivoj kaj pri la mineralaj fontoj kun mirindaj bongustoj, kiuj elspruĉas en la monto.

— Ho ! li diras, ĉiam mi vidos vin.

— Vi vidos min, Mercier ?

Estas tre simpla homo, li serĉas por sin esprimi kaj aldonas nur :

— En la okuloj... mi ĉiam vidos vin en la okuloj...

Kion li do ankoraŭ vidas ! Kio alia subite rebrilas en liaj okuloj ?

Mi kredas... Ho ! jen tio rekomenciĝas.

Estas vere : la krizo rekomenciĝas. Ĝi estas terura. Iel ajn ni agos, ĝi venkos la viktimon kaj, ĉi tiun fojon ni nenion povos...

— Mi sentas, ke mi tuj mortos, li diras.

La ridetantaj okuloj ree petegas :

— Sed vi savos min,... vi savos min !

Mi jam vidas Mercier kun vizaĝo difektita per la morto.

Li diras :

— Restu apud mi.

Jes !... mi restos apud ci kaj mi premezas cian manon. Ĉu ni povos fari nur tion por ci ?

Jen, la naztruoj tremetas. Estas terure esti malfeliĉa dum kvardek jaroj kaj ĉiame forlasi la naivan ĝojon flari la amaran odoron de la juniperoj...

Jen la lipoj, kiuj krispiĝas kaj falas iom post iom malĝoje. Estas terure esti suferinta dum kvardek jaroj kaj ne povi kvietigi sian lastan soifon per la mirinda akvo de la fontoj, kiuj elspruĉas sur montoj viaj...

La ŝvito, la nigra ŝvito denove elfluas el la palega frunto. Ho ! kiel estas maldolĉe morti post kvardek jaroj da laciĝoj, ne havinte tempon por viŝi tiun frunton ĉiam klinigita al la laboro !

La ofero estas grandega kaj oni ne povas elekti sian horon : oni devas konsenti ĝin tuj kiam ekaŭdiĝas la voĉo, kiu ĝin postulas.

Estas necese, ke la homo deprenu sian ilon kaj levigu dirante nur : Jen mi !

Ho ! kiel estas maldolĉe forlasi tiun vivon tute plenigita per laboroj kaj doloroj.

La okuloj ankoraŭ malforte ridetas. Ili ridetas ĝis la lasta sekundo.

Li ne plu parolas. Li ne plu spiras. La koro faletis, faletis kaj ĝi restas senviva, kiel lacigita kurĉevalo.

Mercier mortis. Liaj palpebroj plilarĝiĝas solene al vitrea abismo. Ĉio finiĝis. Li ne estos savita...

Tiam, el la okuloj de la mortinto elfluas grandaj larmoj, kiuj falas sur liajn vangojn. Mi vidas liajn trajtojn krispiĝantaj por plori dum la tuta eterneco.

Mi ankoraŭ konservas dum longaj momentoj la manon de la kadavro inter miaj manoj.

GEORGES DUHAMEL.

Esperantigita de : PIERRE GABORY.

La kulto al kadavroj estas universala frenezo.

CHARLES RICHET.

(1) Eldiru : *Mersie*.

(2) Eldiru : Kantal (departemento ĉe la centro de Francio).

DIVERSAĴOJ

Rezolucio prezentita ĉe la III-a Kongreso de la Komunista Internacio en Moskvo, je la nomo de la Svisia, Francia, Italia delegitaroj kaj de 9 aliaj landoj, ankaŭ je la nomo de delegito de la *Pedagogia Internacio*, kaj apogita de la *Studa Komisio por alprenado de helpa lingvo en III-a Internacio*.

« Konsiderante, ke en multaj landoj komunistaj propagandistoj okupiĝas pri la problemoj de internacia lingvo helpa;

« Konsiderante, ke tiuj klopodoj forprenas el la revolucia movado energiojn ofte grandvalorajn, kaj tio senrezultate, ĉar la batalo inter la diversaj sistemoj (esperanto kaj ido) nepre paralizas iliajn reciprokajn penadojn;

Konsiderante, fine, ke la problemoj en si mem povus havi grandan gravecon por la laboro de la « Komintern » (Komunista Internacio);

La Kongreso decidas:

« La *Studa Komisio por alprenado de lingvo internacia helpa en la III-a Internacio* estas komisiata por ekzamenigi la problemojn de sciencaj ekspertoj kaj prezenti al la proksima Kongreso kaj al la Ekzekucia (rega, plenumanta) Komitato de la « Komintern » raporton kaj konkludojn pri la jenaj demandoj: 1) ĉu la alprenado de internacia lingvo helpa ŝajnas jam praktike ebla, kaj 2), eventuale, per kiaj rimedoj kaj laŭ kia amplekso la Internacio povus ekplenumi ties praktikan aplikon.

Por la delegitaroj de Svisio: Jules Humbert-Droz; Francio: Boris Souvarine; Italio: Cenari; Anglio: Bell; Ĉeĥoslovakio: Burian; Svedio: Hoglund; Jugoslavio: Marković; Luksemburg: Reiland; Meksiko: Ramirez; Hispanio: Merino de Gracia; Japanio: Taguchi; Danio: Niels Madsen; Franca Junularo Komunista: Laporte; Pedagogia Internacio: Jörg Mager.

Ankaŭ 20 delegitoj el diversaj nacioj, kaj Jos. Pogany, Henri Guilbeaux, Hans Itchner, je la nomo de la *Studa Komisio*, subskribis tiun rezolucion.

Tial ke, per ili solaj, la subsignintoj de la propono reprezentas la plimulton de la Kongreso, kaj neniu delegitaro opozicias (unu sola decidis ne partopreni), la K-do Koenen (Germanio), je la nomo de la « Prezidium » (Prezidantaro), deklaras, ke la rezolucio sendebate estas akceptata (kunsido 12 Julio 1921).

La *Studa Komisio*, komisiita por ties zorgi la plenumadon, petas la komunistajn organojn (jurnaloj, revuoj, k.t.p.), ke ili publikigu tiun rezolucion.

Por la Esperantista Blindularo. — La porblindula gazeto *Esperanta Ligilo* estas en malbona financa stato. Favore al ĝi alvokas: Prof-ro Cart, S-roj Macan (Ĉeĥoslovakio), Merrick (Anglo), Stejskal (Ĉeĥoslovakio), kaj Thillander (Svedo), nuna redaktoro de *Esperanta Ligilo*. Kiu povas helpi, tiu sendu monon al komisiona kasisto S-ro W. Percy Merrich, Woodleigh, Shepperton, Anglio.

La Internacia Kontraŭ-Militarista Oficejo. (International) A(nti) M(ilitary) B(ureau). — La I.A.B.M estas fondita je Internacia Kontraŭ Militarista Kongreso en Hago 1921, de la reprezentantoj de Aŭstrio, Belgio, Danio, Anglio, Nederlando, Svedio kaj Svisio.

La I.A.M.B. kontraŭ milito kaj reakcio kunmetita de revoluciem-kontraŭmilitaristaj organizaĵoj, celas kontraŭbatali internacie la militarismon por malebligi la militon kaj la subpremiĝon de la laborista klaso.

Ĝi klopodas plifortigi ĉe la laboristoj la konscion pri ilia decida ekonomia potenco kaj propagandas la ĝeneralan strikon kaj la ĝeneralan rifuzon de militservo.

Ĝi propagandas la tujan ĉesigon de ĉia produktado de

de pormilitaj objektoj. Ĝi instigas al la nefidindigo de la armeo kaj rekomendas la personan rifuzon de militservo.

Ĝi kontraŭas ĉiun klopodon resubjugigi proletariaron, kiu forĵetis la kapitalistan jugon.

Ĝi kontraŭas ĉiujn formojn de ekonomia ekspluatado kaj militarista subpremado de alikoloraj rasoj kaj klopodas, kiel eble plej multe progresigi la unuecon kaj kunlaboradon inter la revoluciema proletariaro de Nordo, Sudo, Oriento kaj Okcidento.

La I. A. M. B. alvokas ĉiujn kontraŭmilitaristajn personojn kaj organizaĵojn; ankaŭ metiorganizaĵoj povos aliĝi al ĝi.

Ĝi serĉas interrilatojn kun kontraŭmilitaristoj en Afriko kaj Azio.

Oni povas skribi Angle, France aŭ Germane al S-ro J. Giessen, Heerenweg 14, Utrecht (Nederlando). Aŭ Esperante per Ned. Lab. Esp. Servo. (Adreso: Alleeweg 9, Enschede (Nederlando)).

Angle-lingva komunikado estas senpage havebla ĉe la unua adreso.

Kamaradoj! Traduku ĉi-supran publikigaĵon kaj enpresigu ĝin en viaj gazetoj. Sendu ekzempleron de la gazeto al: Ned. Laborista Esperanto Servo.

* * *

K-do G. P. de Bruin, Alleeweg, Enschede, Nederlando, Sekretario de la Nederlanda Laborista Esperanto Servo, deziras interrilati kun alilandaj similaj Servoj. — Rezulte de lia alvoko pri alsendo de nacilingvaj laboristaj gazetoj enhavantaj en- aŭ pri-esperantaj artikoloj li ricevis nur *L'Humanité*, *Le Populaire*, kaj *La Bataille*. Ĉu ne ekzistas aliaj? Se jes, sendu tuj.

KRONIKO

Francio

Lyon. — « Esp. Laborista Grupo » kunvenas lunde, je la 20-a, en la sidejo, 6, rue Paul-Bert. — *Dejorado* por ĉiuj informoj pri esperanto: 1^o jaŭde, de la 18-a ĝis la 20-a, pasage Coste, 7; 2^o sabate, de la 15-a ĝis la 18-a, en « Rondo de l'Unuigo de la Sindikatoj », rue du 4-Août. — *Kursoj publikaj*. Pluraj baldaŭ malfermiĝos en diversaj kvartaloj; la ĉefa okazos en la Laborborso. — *Kursoj* senpagaj per korespondado: Du kursoj funkcias la tutan jaron: unu elementa kaj alia pliperfekta.

Marseille. — Dank'al klopodoj de la tiea Esp. Grupo, la *Sindikata Unuigo departementa* alprenis ĉe sia lasttempe okazinta kongreso rezolucion favoran al esp-o, instigante ĉiujn Laborborsojn, ke ili malfermu kursojn. — Laŭ komuniko de K-do MORENO.

Paris. — Fondiĝis « Grupo Esp. de la Franca Preslaboristaro ». Por ĉiuj informoj oni sin turnu al J. POLGAR, 20, rue de Savoie, Paris (6^e).

Germanio

Dresden. — La « Gleagrupa » malfermis 10 kursojn ĉeestataj de pli ol 250 personoj. La instruado okazas en popol-lernejoj.

Hungario

Budapest. — La « Esp. Societo Laborista » vigle propagandas ĉe la Partio socialista. La 12 Junio ĝi aranĝis festeno por la 35-a jara jubileo de esp-o; bonega sukceso, 300 partoprenantoj.

Rusio

Astrahan. — Estas organizita Gubernia Esperanto Komitato. La Komitato ricevis subvencion (777.000 rubl. por unua duono de la jaro 1921) de loka sovjeta. Ĉiuj membroj

de la Komitato ricevas salajron. Komitato jam aranĝis du propagandajn esperanto-koncertojn. Kursoj sub gvidado de K-de Averin.

Kamen. — Konsilantaro de 2-a lernejo decidis enkonduki esp-on en lernejon, kiel devigan instrufakon.

Petrogrado. — Dum la 1-5 de Junio en Petrograd, komitato de la loka Esp. Societo «*Espero*» kunvokis la *Tutruslandan Esp. Konferencon*. En tiu ĉi konferenco partoprenis delegitoj el 79 diversaj urboj de Rusio, Siberio kaj Ukrainio, proksimume 200 p. Ĉeestis ankaŭ oficiala delegito de Ministerio de la Popolklerigado el malproksima-orienta respubliko (el urbo Ĉita). — Esperanto Klubo havas loĝejon (Petrogrado, Italjanskaja 31) kaj oficistojn kiuj ricevas salajron de registaro. Produktaĵojn por klubo (pano, dolĉaĵoj, k.t.p.) oni ricevas ankaŭ de «*Petrosovet*» (t.e. sovjeta de Petrogrado). — Grupo de anarhiistoj (adreso: Grupo «*Liberecano*», Rusio, Petrogrado, Fontanka n° 17) havas kursojn kun 22 p. ĉe loka Anarhiista Klubo.

Dua Konferenco de ESKI

La 4 Junio, okazis en Petrograd (Rusio) malfermo de dua Konferenco de Esperanta Komunista Internacio (ESKI).

En honoran prezidkomitaton estis elektitaj K-doj Tom Mooney (Usono), E. Nikolaŭ (Rumanio) kaj Mark Star (Anglio). Oni decidis sendi salutleterojn al K-doj Mooney kaj Nikolau, kiuj nun estas en malliberejo, kaj al Mark Star, salutante lin, kiel reprezentanton de strikantaj anglaj karb-ministoj.

Krom tio estis proponite kaj akceptite sendi saluttelegramon al tria kongreso de Komunista Internacio kaj salutleteron al *Liberiga Stelo*, inicianto de la ruĝa esperantista kongreso.

La Konferenco pridiskutis multajn politikajn kaj organizajn demandojn kaj donis al novelektita Centra Komitato de ESKI grandajn taskojn.

La Konferenco decidis, ke en laborista esperantista movado de tuta mondo ESKI devas agi per principoj kaj taktiko de III-a Internacio.

En C. K. eniris 7 membroj kaj 3 kandidatoj.

La Konferenco finis sian laboron la 6 Junio.

Jenan leteron la Konferenco sendis al L. S. :

Al Centra Komitato de «Liberiga Stelo», Parizo.

Dua Konferenco de Esperanta Komunista Internacio (ESKI) salutas vin, kiel inicianton de la Esperanta Ruĝa Kongreso, kiun vi organizas por unuigi komunistajn, socialistajn, sindikalistajn kaj liberecanajn elementojn en unu fortikan taĉmenton de la mondrevolucio.

Ni kredas, ke ĝi povas esti ligita nur per la principoj, per regularo kaj per sango kun la Komunista Internacio, gvidanto de la mondrevolucio.

Ni esperas, ke la movado, apartigita de ni, jam unuigita per unika ideo kaj ago komunistaj, ne estos iu sekta propagando sole nur de ideoj, sed ĝi utiligos la sperton kaj laboron, faritajn de diverslandaj kamaradoj en Sovjetlando.

Vivu Esperanta laboristklasa movado!

Vivu ĝia komunista avangardo!

DUA KONFERENCO DE ESKI.

Samara. — Unua gubernia komunista Konferenco de malgrandaj Nacioj akceptis rezolucion, aprobanta propagandon de esp-o kaj esprimante deziron pri enkonduko de internacia lingvo en lernejojn, konferenco komisiis al gubernia fako de malgrandaj nacioj malfermon de kurson, eldonadon de lernolibroj, k. t. p.

Vologa. — Kunveno de esperantistoj-komunistoj kaj membroj de Rusa Komunista Ligo de Gejunularo, la 25-an de Majo, decidis organizi grupon de ESKI.

Pagi regule sian abonon estas la unua devo de ĉiu leganto.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Ĉe la Internacilistoj

Okaze de sia vizito en *Hamburg-Altona*, nia angla k-do kaj samideano *Mark Starr*, parolis antaŭ la funkciuloj de la Komunista Partio per esp-o. K-do *Theobald* tradukis germanen.

Mark Starr esprimis sian ĝojon, ke esp-o ebligas al li, paroli antaŭ germanaj K-do, sed bedaŭris, ke en la laboristaro la neceseco de internacia komprenigilo ne ankoraŭ estas ĝenerale konfesata kaj tial la tradukado de sia parolado ankoraŭ estas necesa.

Poste li parolis pri la angla laboristarmovado ĝenerale kaj montris la evoluadon de la angla Komunista Partio el la radikalaj elementoj de la diversaj laboristaj Partioj. Poste li raportis pri la lasta ministra striko kaj klarigis la malvenkon de la ministoj per la malsolidara sintenado de la fervojistoj kaj transportistoj kaj per la sintenado de la flavaj sindikalistoj, kiuj pro timo je la revolucio malfidis la ministojn. Plie solida internacia kunigo estas necesa. Pro liverado de karboj de Germanio al Francio kaj Anglio la angla ministaro estis devigita reiri en la minejojn.

La striko estis kaŭzata per la minaco de la minposedantoj redukti la salajron. La ministoj kontraŭe postulis la nacian egaligon de la salajro t. e. samrajte salajri la ministojn de la malpli profitaj minoj, kiel la ministoj de bonprofitaj, kaj nacia kontrolo de la minejoj.

La granda senokupeco en Anglio estas parte kaŭzata de la plenumo de la pakontrakto de Germanio. Per la liverado de materialo, karbo, ŝipoj, k. t. p., al Francio kaj Britio, la anglaj fabrikoj, minoj, ŝipfarejoj estas parte fermitaj kaj la laboristaro maldungita. La laboristaro de unu lando ne povas profiti per la subpremo de alia lando. K-do Starr atentigis, ke por la venontaj grandaj internaciaj bataloj spirita kunigo de la internacia laboristaro per esp-o estas nepre necesa.

Post traduko de K-do Theobald, okazis viva diskuto. Oni ĝenerale esprimis la ĝojon pri la praktika aplikado de Internaciismo. K-do Theobald akcentis la necesecon de esp-o kiel grava helpilo en la klasbatalo de la int. proletario. Esperanto devas esti konsiderata ne kiel memstara liberigilo de la proletario, sed nur kiel helpilo por la revolucia batalo. Poste K-do Starr finparolis.

Per la parolado de K-do Starr kaj la uzado de esp-o, la atento de la laboristaro estas tirita al nia lingvo. En la kom. junular-movado kaj en diversaj distriktoj de la Kom. Partio, oni petis paroladojn pri esp-o. TH.

Ĉe la Naciistoj

Malsaĝa azeno (1),

Kiel ĝoja mi estas, diri al ci, kia porkaĉo ci estas. Mi volas diri al ci: ci estas granda porkaĉo. Mi diras kotaĉo por ŝtelisto, por cia patro, cia patrino, cial ĝeamikoj kaj cia lando.

Cia patro mortigis miajn gepatrojn, kaj li paŝacis mian karan landon.

Sed, venis tago, ke vi, porkaĉoj, ne plu havis terpomojn por manĝi, kaj mem vi ankoraŭ devas manĝi ties ŝelojn.

Mi volus ĵeti cin antaŭ la buŝegon de sovaĝa besto. Ja ci estas porkaĉo, koto, k. t. p.

Ci, porkaĉo, devas skribi al mi france, kaj, mi ankoraŭfoje diras: Malsaĝa azeno.

J. BOYER,

196, rue de Pessal, BORDEAUX, Francio.

(1) Tiu letero estis sendita de la supre nomita sinjoro al sia antaŭmilita korespondanto germana. Superflue estas komenti. Tamen ni diru, ke verŝajne en Germanio ekzistas ankaŭ samspecaj naciistoj. Estas tre dezirinde, ke nova milito, al kiu partoprenus nur tiuj patriotoj, okazu kiel eble plej baldaŭ. Ili sin interbuĉadu ĝis la lasta. Poste la paco eble povos esti en la mondo! — RED.

LETERKESTETO

Estas absolute neeble al mi danki letere al ĉiuj kamaradoj, kiuj bonvenis kaj helpis min dum mia vojaĝo. Ili trovu ĉi-tie plej sinceran dankesprimon. En ĉiu urbo de mi vizitata, alvenante mi trovis bonajn, helpemajn kamaradojn, forirante mi lasis amikojn! Fratece E. ADAM.



LIBROJ KAJ BROŝUROJ

Esperanto. *La gramatiko de D-ro Zamenhof kun komentario de prof-ro P. CHRISTALLER.* Eldonis WILHELM VIOLET, *Stuttgart*. Formato: 13×19 cm. 73 p. Kartonita. Prezo nemontrita.

En la antaŭparolo la aŭtoro diras pri sia verko: « ĝi estas krome intence ne lernolibro por komencantoj, sed in-formejo por ĉiuj perfektigemaj jamaj esp-istoj, samtempe ekzercolibro per la esperantigo aldonita, kiu cetere ne ĉiam estas laŭvorta, kaj kiu iafaje kompletigas la germanan lingvon.

Bazo por mia laboro estas la fama pra-gramatiko de D-ro Zamenhof, kun ĝiaj dek ses reguloj senesceptaj. Tiuj reguloj estas komentitaj en nombritaj paragrafoj, kaj utiligita estas la plej esenca enhavo de la Zamenhofaj «Lingvaj Respondoj».

Ne estas eble diri pli ĝuste. Niaj germanaj k-doj ĉerpos el tiu libro plej bonajn klarigojn kaj konsilojn. Mi aldonu, ke ne nur la germanoj sed ankaŭ ĉiuj esp-istoj povas iel profiti de tiu libro.

Kvankam akademiano, S-ro Christaller ne ŝajnas esti fanatika konservemulo. La sufiksoj *oĝ* kaj *end*, la prefiksoj *fi*, *retro* kaj *mis* estas de li uzataj, kaj li eĉ mencias *iv*, *iĝ* kaj la finiĝon *io* por landnomoj. Mi trovis ankaŭ la vortojn «majuskulo» (grandlitero), «trajno» (vagonaro). La libro estas bone presita, preskaŭ senprezerara, unuvorte plej rekomendinda.

La Struvelpetro. Beletaj rakontoj kaj komikaj bildoj, de D-ro HEINRICH HOFFMAN. Esp-ta traduko de J. D. APPLEBAUM. Literatura Instituto Rütten & Loening, *Frankfurt-a-M.* Kartona albumo 21×26 cm., 24 koloraj bildoj kun versa-ja teksto. Prezo: M. 18, por altvalutaj landoj 36 M.

La titolo en germana signifas kromnomon de malbona petolulo. La verko estas destinata al infanoj kaj celas igi ilin bonkondataj.

Interlingua. *Lingua internazionale con ortografia latina.* **Vocabulario** di GAETANO CANESI kun prefazione di G. Peano. Eldonis: G. B. PARAVIA & C., *Torino*.

Dekdua Universala Kongreso de Esperanto. *Kajero tridekunua de la Esperantista Dokumentaro.* Eldonis *Esperantista Centra Oficejo*, 51, rue de Clichy, *Paris*. Formato: 16×24 cm. 112 p. Prezo: 3 fr.

Amo per proverboj. *Unuakta komedio* de ARTHUR AZEVEDO. El la portugala tradukis A. COUTO FERNANDES Eldonis OSCAR ZIEGLER & Co, *Marktredwitz* (Bavario). Formato: 11×18 cm. 16 p. Prezo: 3 resp. kup.

BES-a Adresaro de Esp-istoj el ĉiuj landoj (1921). Eldonis *Bohema Esp-o Servo Moravany* (Bohemio). Formato: 11×15 cm. 68 p. Prezo: 1,50 fr. sv.

Kantaro por laboristaj esp-istoj. Eldonis *Dresdena Laborista Grupo*. Formato: 7 1/2×16 cm. 16 p. Prezo nemontrita. Havebla ĉe HUGO KOCH, *Dresden-N. 23*, Trachenberger str. 56. Dektri diversaj kantoj tre taŭgaj por esp. laboristoj.

Monna Liza, de MIKAELO GERASIMOV. Tradukis el la rusa N. V. NEKRASOV. Eldonis Esp. Literatura Asocio, rusa sekcio: *Moskvo*, Ia. Iverskaja Jamskaja, 35. Formato: 12×17 cm. 12 p. Prezo nemontrita.

Fratoj, de ELLIN-PELIN. Tradukis el la bulgara GEORGI FANDIKOV. Formato: 10×15 cm. 16 p. Prezo: 8 Sd. Mendebla ĉe Centra librejo «*Esperanto*», *Sofia* (Bulgario).

La Fonto de la Blankpiedulino, de PETKO SLAVEJKOV. Tradukis AT. D. ATANASOV. Sama formato, sama prezo kaj havebla ĉe la sama loko, kiel supre dirite.

La Unua Ondo. Kolekto de originalaj versaĵoj. Eldonis Kooperativo «*Volgano*», Rusio, *Saratov*, Birja poŝtkesto n° 48. Formato: 12×17 cm. 16 p. Prezo: 50 kop.

Ĉu estas aplikeblaj la fizikaj leĝoj al la Universo? de O. D. HŬOLSON. El la rusa tradukis V. STAROJŬSKIJ. Formato 13×17 cm. 16 p. Prezo: 75 kop. Mendebla ĉe la sama loko, kiel supre dirite.

La Koboldo Ondra, de JIRI MAHEN. Tradukita el la ĉeĥa kaj eldonita de *Moraviaj Esp-o Pioniroj*, en *Olomouc* (Ĉeĥoslovakio). Formato: 11×15 cm. 40 p. Prezo: 1,50 fr. fr.

Virinoj vi kunigu vin! militu kontraŭ militon! de P. CHRISTALLER. Bela ilustrita P. K. eldonita de Esp-o Oficejo, *Stuttgart* (Germ.). Neue Weinsteige 61. Prezo: 10 ekz. 4 resp. kup.; 100 30 respk.

Lingvo de Internaciano, de ANTON AMNUEL. Eldono de Kazana Distrikto, Komitato de ESKI. Formato: 13×20 cm. 8 p. Prezo nemontrita. Ruslingva broŝuro, kies titolo klare montras la celon.

De Maatschappij van den Arbeid, de LEO FRENSEN. Formato: 20×15 cm 8 p. Prezo: 0,25 cent. Havebla: Uitgave «*De Nieuwe Wereldorde*», Elisabethplaats, 59, *Antwerpen*.

MUZIKAJOJ

La vojaĉo. Humora kanto originala. Verkis kaj komponis H. MOY THOMAS. Eldonis Germ. Esp. Eldonejo, *Leipzig*. Formato: 20×28 cm. 2 p. Prezo: M. 3.

Kvinstrofa, kumora kanto facile ludebla sur fortepiano.

Mia Verdstelulino. Valsa kanto. Vortoj de W. M. PAGE. Muziko de H. MOY THOMAS. Eldonita de Germ. Esp. Eldonejo, *Leipzig*. Formato: 20×28 cm. 2 p. Prezo: M. 3.

Tristrofa amkanto kun notoj de fortepiano-muziko.

GAZETOJ

Lingvo Internacia (Aŭg. 1914-Dec. 1920), 33, rue La-cépède, *Paris*. — «... Ĉar al la homa naturo ĉiam estas iel malfacile konfesi eraron kaj kvazaŭ pente reveni al la ĝusta vojo», D-ro P. Corret daŭrigas arde batali kontraŭ la *ioanoj*. Naŭ plenajn paĝojn li bezonis por pravigi sian nepravigeblan vidpunkton. Tiel ni eksciis, ke «tre bone kaj regule ni povus uzi la vorton *bonio* kun la senco io bona. Se vere, kiom malfacile estas scii la ĝustan sencan de esp. vorto. Kiam ekzemple, oni legas *kranio*, oni devas sin demandi ĉu temas pri io krana, eble pri *kranio* de kranisto, aŭ pri cerbujo!! Dio mia, kion do signifas la vorto Akademio?»

Eble S-ro Akademiano D-ro P. Corret, estas blinda fanatikulo, sed certe S-ro Akad. A. Grabowski estas plagiato. La de li subsignita poeziaĵo «*La disigitaj*» estas simple traduko de «*Les Séparés*», de Marceline Desbordes-Valmore...

Nu, jen io pli grava: S-ro Akad. Edm. Privat ĉu ne scipovas esp-on, ĉu malrespektas la Fudamenton. Ambaŭokaze, li ne indas esti Akademiano! Eble D-ro Privat ne scias ĝuste uzi la akuzativon kun *kiel*, sed ni tamen ĝuis grandan plezuron legante la priproĉitan verkon *Vivo de Zamenhof*...

La Rejna Stelo (Aŭgusto), Adm.: 31, rue de Sarrebourg, *Schiltigheim*. Red.: 19, rue Glaubitz, *Strasbourg-Neuhof*. — Ĉi tiu 1-a numero estas redaktata en franca, germana kaj esp-o. La ĉefartikolo komencas jene: «Pli mi pripensas la estantan tempon, pli mi konstatas...»

Mi haltu, ĉar ju pli mi daŭrigu, des pli mi konstatus..., ke eble la eldono de tiu gazeto ne venis en ĝusta tempo.

Komunist-Esperantisto. *Monata organo de V'portugalaj komunist-esperantistoj*. Red. kaj Adm. R. Arco Marquez d'Alegrete, 20-2° D. *Lisboa* (Portugalia). — 1-a n-ro (Julio). En portugala kaj esp-o. Ĉu tiu gazeto ankaŭ naskiĝis en oportuna tempo? La estonto respondo. Ni almenaŭ ne silentu pri tiu entrepreni, kiel oni faras en Portugalio pri la nia.

Pro manko de loko, la enpresado de la jenaj artikoloj aŭ tradukaĵoj devis esti prokrastata: Terura Rakonto, de H. Raison; Reakcio, de Aapo Pärnänen; La Maltimo pri la Vero, de Else; Ni ne kompliku la lingvon, de J. Habert, kaj aliaj. — RED.

NEKROLOGIO

Vradim Aleksandro STOPANI

Kun vera kortuŝigo ni eksciis pri la morto — memvola morto — de tiu nia juna K-do. Li estis unu el la unuaj anoj de S. A. T., kaj ni tre kalkulis je li por vivi nian movadon en Oriento.

Filo de A. Stopani, rusa statistikisto, regiona ĉef-komitato de Sovieta Rusio, li naskiĝis en Kaŭkazo, kaj 18-jare, sin memmortigis en *Sanhaj*, kien li estis forkurinta por ne militservi en la Kolĉaka armeo.

Li lasis leteron en kiu li klarigis, kial li forkuras el la vivo: « Mi mortas kun rideto sur miaj lipoj, li diras. Ĉu oni povas timi lokon, kie oni ne estas, kaj tempon, kiam oni ne ekzistas. Ne vera estus la opinio, ke mi malekzistigas min pro malesperigo je vivo. Ne, pli vera estus la opinio, ke mi malesperigis je mi mem, sed ankaŭ ĝi estus tute ne vera. Ne havi propran saĝon kaj vidi ĉirkaŭe malsaĝecon estas malfacile por mi. Ha! Sufiĉe ».

Tiu junulo estis cedema, silentema kaj influema. Dum la lastaj tempoj li multe legis Ŝopenhauer, Vajninger kaj aliajn filozofojn de l'pesimismo. Cetere V. Stopani antaŭnelonge estis eksciinta, ke en Baku sin memmortigis lia frato kaj 3-4 el liaj kunlernantoj.

Ĉinoj, Koreanoj, Rusoj ĉeestis la entombigon, kiu, laŭ deziro de la mortinto, estis tute senceremonia.

Laŭ notoj, *afable tradukitaj de HELMI DREZEN, el la rusa gazeto « Sanhajo-Vivo ».*

Antonin GRABOWSKI

(† 5 de Julio 1921)

La kruela morto forrabis al ni nian plej bonan esperantiston, nian plej talentan poeton, nian plej majstran tradukiston.

Li naskiĝis en j. 1857, en Chelmno. La gimnazon li vizitis en Torun kaj universitaton en Breslaŭ, kie li ricevis diplomon de inĝeniero. Li tradukis interaliaj « Mazepa » kaj « Halka », kiujn admiris la kongresanoj de la XII-a sur la scenejo. Al polaj esperantistoj li preparis bonegajn vortarojn pole-esp-an kaj esp-e-polan, « El Parnaso de Popoloj » estas la kolekto de majstre tradukitaj poeziaj el tridek lingvoj. Lia lasta verko estas la konata pola epopeo « Sinjoro Tadeo », de Mickiewicz, je kiu li laboris preskaŭ du jarojn, kaj kiu estas ankaŭ perlo en nia literaturo. Per multe da tradukoj el polaj aŭtoroj: Prus, Reymont, Sienkiewicz, Konopnicka, k. t. p., kaj ankaŭ el diversaj aliaj lingvoj, li riĉigis nian literaturon. Li apartenis al L. K. kaj al la Akademio.

SALO GRENKAMP.

AFORISMOJ

Animo kutimas solecon — kiel okulo malhelecon.

☆

Kiel marmoro estas gloro: ŝparata en de la vivantoj, oftega en de la mortintoj — domo.

☆

Originaleco en multaj artistoj konsistas nur en kelkaj maniaj konvulsietoj.

☆

Ni kredas ami personojn, kaj ni amas nur simbolojn.

☆

Ne ekspluatu homan paciencon: en certaj kondiĉoj, la plej bona vino vinagriĝas.

☆

Ni koleras kontraŭ nia bonfarinto, kiam ni sentas ke liaj « bonfaroj » donas al li rajton super nia libereco: tiam oni nomas nin maldankemaj.

L. CHARLES-BAUDOUIN.

(Originale esperante verkita.)

Sennacieca Asocio Tutmonda

23, Rue Boyer, Paris-XX^e

OFICIALA INFORMILO

Celo: Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).

Jarkotizo: Laŭ valoro de unuhora salajro meza — Anglio, 17 pencoj; Aŭstrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev.; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes.; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Polio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr. fr.; Usono, 35 cend., k. t. p.

Membreco kaj jarabono al « Sennacieca Revuo »: Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.

(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu *prefere* per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole).

**

Generala voĉdono pri statuto. — La 1-an septembron, ni sendis al ĉiu membro unu specimenon de la statuto-projekto debatita ĉe nia kongreso en Praha, kaj unu voĉdonilon. Je la tago, kiam ni redaktas tiujn ĉi liniojn, la baloto ne estas finita, tamen la opinio de la ĝis nun ricevitaj respondoj permesas antaŭscii la definitivan rezultaton: la statuto-projekto estos certe aprokata per granda plimulto.

Tial ni permesis al ni jam aperigi tiun ĉi informilon sub la nova titolo « S. A. T. », kaj la organon sub « Sennacieca Revuo ». Same ni fiksas la kotizon konforme al decido de la kongreso; ankaŭ specialan ciferon por la membroabonantoj.

Ĉar la kongreso aprobis la planon de geografiaj sektoroj de S. A. T. (kion verŝajne konfirmos la voĉdonado), ni devas jam nun prepari la elekton de la Komitato, kiu anstataŭos la iniciatoran komitaton. Baldaŭ ni eldonos tutmondan geografian karton de la sektoroj, kio komprenebligas la sistemon al ĉiuj. Atendante ĉiu povas konsulti la april-majan « Esperantista Laboristo », kiu donas sufiĉan skizon de la plano.

Verŝajne, tiu voĉdono okazos en februaro 1922. Do! ĉar laŭ artikolo 12, la kandidatoj al Komitato devas esti konataj 3 monatojn antaŭ la baloto, tial kiuj aspiras al ofico de komitatano, tiuj devas sin deklari tuj al sekretario, kiu sendos al ili « demandaran formulon ».

Jam sentiĝas la efikoj de nia kongreso. Kelkdekoj da novaj membroj, dum kaj post la kongreso. Plie, ĵus fondiĝis grupo en Pilzen (Ĉeĥoslovakio): pli da 25 anoj.

**

Ni intencas eldoni baldaŭ nian unuan jarlibron. Kompren-eble, ĝi unue entenos la adresaron de la S. A. T.-anoj. Ni provos igi ĝin pleje interesa kaj praktika..., proporcie al nia financpovo. Ni bezonas la kunlaboradon de kompetentaj kamaradoj; ni petas ilin sendi sian ideon kaj planon.

LA SEKRETARIO DE S. A. T.

Ĉiu klaskonscia kaj konsekvenca esperantisto devas aniĝi S. A. T.!

Petu la novan statuton.

KORESPONDADO

TARIFO : Unu enpresoj, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr.
Dek-du enpresoj, 6 fr.

MALLONGIGOJ : L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkartoj ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. bfl = poŝtmarko sur bildflanko. k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj. Esp-ajo = Esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

BULGARIO

Panajot Nikolov, str. Sveti Georgi, n° 73, *Plovdiv*. L, PI k.ĉ.l.
K-do Anĝelo Todorat, str. Hajredin paŝa 5, *Plovdiv*. L pri ĉiuj temoj.

K-do Marin Boŝkot, str. Topolnica, 4, *Plovdiv*. PM, L.

GERMANIO

K-do Otto Steinfusth, Bahnstr. 39, *Berlin-Schöneberg*, k.ĉ.l.
PI kaj L pri socialista movado; ĉiam respondas.

K-do Walter Svheimet, Gothenstr. 31, *Berlin-Schöneberg*, k.ĉ.l. PM, PI, L; ĉiam respondas.

K-do Hans Fannet, kompostisto, Sickingenstrasse 3-III, *Dresden-Striesen*, deziras korespondi pri migradoj kun gek-doĵ el tutmondo, L, PI.

K-do Heinrich Frickart, Naüheimerstrasse 2/1, *Frankfurt-a-M.* West 13. PI k.ĉ.l., PM bfl; respondas tuj al ĉiuj.

K-do Fried. Gauch, Sossenheimerstr. 6, *Frankfurt-a-M.* PI, PK, L, pri socia movado. Tuj respondas.

K-do Ludwig Puff, Josbacherstr. 20 ptr., *Frankfurt-a-M.* k.ĉ.l., pri aktualaj demandoj, naciaj socimovoj kaj kutimoj.

F-ino Louise Geisel, *Sprendlingen (Kreis Offenbach-a-M.)*, Eisenbahnstr. 53 ptr., PI artistaj, L pri socia movado, moro, k.ĉ.l. kun gejunuloj.

K-do Kurt Quell, Nestitz-Wallwitz str. 6, *Leipzig-Gr. Zsch.*, esper. gazetoj, k.t.p.

K-do Pinger Kurt, Leützscher str. 45, *Leipzig-Lind.*, esper. gazetoj kaj PM.

K-do Beütel Kurt, Gemeindeamtstrasse 20, *Leipzig-Lindenaü*. PI, L, PM; tuj respondas.

K-do Emil Ziegler, Friedrich Schmidtstr. n° 9, *Leipzig-Gross-Zschocher*. PK kun instruantoj (kursgvidantoj) de esp-o kaj propagandistoj k.ĉ.l.

Rusaj gekamaradoj atentu! — Kiu povas doni informojn pri K-ino Alida Ŝuman Narva? La adreso estis en 1914: Alida Ŝuman Narva, Petrovskij forst. 7 uul. 7 kv. 8. Mi tre ĝojus ion ekscii pri farto kaj nuna adreso. — F. C. Richter, *Leipzig-Stötteritz*, Sommerfelderstr. 44, ptr.

La Laborista Grupo de Mainz-a-Rh. (anoj de S. A. T.) kun gekam. ĉ.l. per L aŭ PK pri seriozaj temoj. Sin turni al K-do Bernhard Viktorin, *Frauenlobstr. 20/11, Mainz-a-Rh.*

K-do Fritz Menz, Heumarkt 6, *Magdeburg*, pri teatro kaj muziko, k.ĉ.l. L., PK.

HISPANIO

K-do Svavie Sveboda, strato Bains Viejos, 5-2, *Barcelona*.

HUNGARIO

K-do Kiss, Kolomano, Tökölyhy-u. 20/1/5, *Kispešt*, k.ĉ.l.

RUSIO

Ivan Iovlev, fabriko Konstantinova, *Ivanov-Voznesensk*, kun francoj.

K-do Nik. Farbejev, Studjonaja 53, Socio Esperanto, *Nijnij-Novgorod*, kun Sud-Ameriko, Aŭstralio, Nov-Zelando.

N-Novgoroda Grupo de ESKI tre petas sendi al ĝi diversajn Esperantaĵojn interŝange je rusaj Esperantaj eldonoj. 12 gek-doĵ deziras korespondadi pri diversaj temoj; oni petu adresojn. Adreso: Studjonaja, 53.

K-ino artistino Anno Nikolaeva, domo n° 3, loĝ. n° 27, Mitavskij pereulok, *Petrograd*. L, PK il. kaj gazetoj.

K-do artisto V. J. Kaĉalin, domo 3, loĝ. 27, *Petrograd*. PK, vidajoj de teatraj spektakloj, dekoracioj, k.t.p.

Simon Podkraminez (studento), Petropavlovskaja, 4, *Petrograd*. L k.ĉ.l., interŝangas gazetojn.

Peresadin V. J. (16-jara lernanto), *Petrograd*, Nikolajevskaja 74, k.ĉ.l. gejunuloj.

Vs. Basov, 2 Posadskaja 19, *Orel*, pri psikologio kaj pedagogio k.ĉ.l.

Multaj samideanoj el la urbo *Simbirsk* deziras korespondadi. Loko mankas al ni por enpresoj ĉiuj nomojn. Oni petu adresojn al S-ro Fetorov Bazilio, poŝtoficejo, Poŝtotelegrafnaja kontora.

K-do Boris Sulatikov, Urjuma Societo Esperanto, Vjatskoj gubernii, *Urjum*, pri verkoj de L. Tolstoj.

SIBERIO

K-do Drozdov, Novaja 43 aŭ 18, *Omsk*. L pri diversaj sciencaj demandoj k.ĉ.l.

JUS APERIS :

la unua volumo de nia literaturo :

Tri Verkoj de Tolstoj

El rusa lingvo tradukis J. M.

(Korektita kaj aprobita de Literatura Esperantista Asocio)

Kun portreto de la aŭtoro
kaj antaŭparolo de ROMAIN ROLLAND

82 paĝoj.

PREZO AFRANKE : 4,50 franca franko por landoj kurzsufierantaj rilate al franca franko.
Por anoj de S. A. T nur 4,10 fr. fr.

3 francaj frankoj por Francio kaj ceteraj landoj. — Por anoj de S. A. T. 2,25 fr. fr.

(Pagebla prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj.)

Havebla ĉe S. A. T., 23, rue Boyer, PARIS (XX^e)

JUS APERIS :

Cours Rationnel et Complet
d'ESPERANTO

Préface de HENRI BARBUSSE

Eldonita de :

Fédération Espérantiste Révolutionnaire
23 bis, Rue Morère, PARIS, 14^e

Ĉiu franclingvano instruanta Esperanton devas nepre uzi tiun lernolibron.

Formato : 13 × 20 cm., 208 paĝoj

Prezo : 5 fr. francaj (Afranke : 5 fr. 50)

Mendu viajn librojn ĉe nia librejo (petu katalogon)

Le Gérant, E. LANTY.



CENTRA PRESEJO ESPERANTISTA
IMPRIMERIE ESPÉRANTISTE V. POLGAR
33, rue Lacépède, PARIS